



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報


9

1971




Vivu Prezidanto Maŭ !





Prezidanto Maŭ Zedong kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ.











Jang Zajgong (*la dua de maldekstre*), estro de la revolucia komitato de Janggialing-brigado, rakontas sur la kampo, kie antaŭe Prezidanto Maŭ kulturis legomojn, al intelektaj junuloj pri la penema luktado de la jan-an-a popolo en la pasinteco.

Jang Buhau, labora modelo de la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a limregiono dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, ĉiam tenas sian ardan revolucionan entuziasmon por fari novan kontribuon al la popolo.
















riko Ruġa Flago produktas grandan  
or subteni agrikulturan produkton.


Venkinte naturan katastrofon, la vastaj amasoj de Nannivan-komunumo akiris pli-produkton de rizo.



Disvolvante la spiriton de penema luktado en malfaciloj, la popolo en Jan-an-regiono konstruas ŝtuparajn kampojn sur la loesa altebenejo.







La jan-an-a popolo aktive disvolvas lokan industrion apogante sin sur propraj fortoj. Jen la jan-an-a term-elektrejo kun kapacito de 6,000 kilovatoj.

La laboristoj de la Jan-an-a Maŝinfabrika levis altan tajdon en tenado de revolucio kaj stimulo de produkto.



# La Nacioj de Ĉinio

## Marŝas

### sur Larĝa Vojo

ĈINIO estas lando kun multaj nacioj kaj ankaŭ lando kun longa historio, revolucia tradicio kaj elstara heredaĵo. Sed en la damninda malnova socio, pro agreso de imperiistoj kaj kruela subpremo kaj ekspluato fare de la regantaj klasoj de diversaj dinastioj, la nacioj vivis en ekstrema mizero kaj postrestinteco kiel sklavoj. En la lasta duonjarcento, kamarado Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio gvidis la popolojn de diversaj nacioj en brava batalado kaj turnis Ĉinion, kiu multe trafis katastrofojn, en socialisman landon fundamente prosperan kaj fortan.

#### ĈIO KRESKAS DEPENDE DE LA SUNO

*Ruĝas la oriento,  
Leviĝas la suno,  
En Ĉinio aperis Maŭ Zedong;  
Li laboras por feliĉigi la popolon,  
Kaj li estas granda savanto de la popolo.*

La aŭtoro de la kanto *Ruĝas la Oriento* Li Joŭ-juan loĝas en la vilaĝo Ĝanggiaĝuang de Ĉengguan-komunumo, Ĝiahian-gubernio, Ŝenhi-provinco. En sia tempo, komponante la kanton *Ruĝas la Oriento*, malriĉkamparano Li Joŭjuan jam diris: “Sen la suno plantaĵoj ne povus kreski kaj sen Prezidanto Maŭ la ĉina popolo ne povus akiri la liberigon.” Multaj maljunaj malriĉkamparanoj, maljunaj komunistoj, ekssoldatoj de la Ruĝa Armeo kaj maljunaj ekspartizanoj en la hejmloko de Li Joŭjuan tre emociiĝis, kiam ili rememoris la tragikan vivon

en la malnova socio kaj la feliĉajn jarojn en kiuj ili faris revolucion por liberiĝo sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Ili neniam forgesos la militajn tagojn en kiuj ili transportis vunditojn per brankardoj, sendis impostan grenon, faris ŝuojn por la armeo, klopodis akiri informojn pri la malamiko por subteni sian propran armeon. En tiuj laboroj estis Prezidanto Maŭ, kiu donis al ili kuraĝon kaj forton por venki la malamikon. En la periodo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, ankoraŭ estas Prezidanto Maŭ, kiu ĝustatempe montras al ili direkton de marŝo, dank’ al kio ili akiris venkojn unun post alia.

En la unua printempo de la sepdekaj jaroj, la popolo de la gubernio pluapase disvolvis la spiriton de Jan-an. Malgraŭ tranĉa frostoj la popolo de Ĝiahian-gubernio batalis kontraŭ glacio kaj neĝo, fosis kanalojn, konstruis digojn kaj laĝetojn per ŝtonoj en altaj montoj. En kelkaj monatoj de la pasinta vintro kaj la ĉijara printempo, la popolo konstruis 47,000 muojn da “Daĝaj-tipaj kampoj” kaj superplenigis la taskon de fundamenta konstruado por akvoutiligo de la tuta jaro.

En la pasinteco, la distrikto de Ĉengguan-komunumo kie loĝas la aŭtoro de la kanto *Ruĝas la Oriento* estis tre malriĉa montvalo, kiu trafis preskaŭ ĉiujare katastrofojn. Hodiaŭ, sur la kalvaj montoj kaj en profundaj valoj oni konstruis multajn ŝtuparajn kampojn kaj sur la bordoj de la Flava Rivero oni plantis jujubarbarojn. Ĉie regas prospero.



## IRI LA FELIĈAN SOCIALISMAN VOJON

Herbejo Nalati de la Ili-a Kazaĥa Aŭtonoma Subprovinco de Hingiang estas sukoplana paŝtejo okcidente de Tianŝan-montaro. En la malnova socio, sub la ekspluato kaj subpremo de mandarenoj kaj brutarposedantoj, la vastaj amasoj de kazaĥaj paŝtistoj tutjare nomadis por serĉi paŝtejon riĉan je akvo kaj herboj kaj havis nek sufiĉan manĝaĵon nek taŭgan veston. Sed nun, sur la senlima herbejo bolas la vivo kaj ĉie paŝtiĝas gregoj de grasaj ĉevaloj, bovoj kaj ŝafoj.

En 1955, Prezidanto Maŭ publikigis la brilan verkon *Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo* kaj la tieaj paŝtistoj tuj ekagis. Maljuna paŝtisto Manapu, kiu laboris 30 jarojn ĉe brutarposedantoj

en la pasinteco, unuigis 22 malriĉajn paŝtistajn familiojn kaj fondis la unuan paŝtan kooperativon sur la stepo. En tiu tempo, klasaj malamikoj freneze kriaĉis: “Sablo, kiom ajn multa en kvanto, ne povas fariĝi ŝtono kaj sklavo, kiel ajn obstina, ne povas fariĝi touĵen (feŭda reganto); la kooperativo de Manapu ne daŭros longe.” Fronte al la subfoso de klasaj malamikoj, Manapu kaj la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj neniom ŝanceliĝis. Ili diris: “Hundo bojas, sed kamelaro vojas. La socialisma vojo montrita de Prezidanto Maŭ estas nia unika vojo!” Ili unuigis kvazaŭ unu homo, batalis kontraŭ la naturo, tiel ke pli kaj pli boniĝis ilia bredado, kaj pli fortiĝis kaj disvolviĝis ilia kolektiva ekonomio. Prenante tiun ĉi kooperativon kiel ekzemplon, la paŝtistoj sur la stepo organizis sin unuj post aliaj kaj rapide efektiviĝis kooperigon tra

*Membroj del a partia filio de la kvina brigado de Ĉengguan-komunumo, Ŝaĉe-gubernio de Hingiang iras al kamplaboro kune kun komunumanoj de tiu brigado.*



*Spite al frosta neĝ-vento, paŝtistoj de Tuangie-paŝtejo de Hingiang laboras sur la vintra paŝtejo.*



la tuta regiono Nalati. En 1958, ili starigis la popolan komunumon Orienta Vento. Disvolvante la revolucion spiriton de penema lukto en malfaciloj, la komunumanoj iris surmonten por haki arbojn, iris malproksimen por alporti ŝtonojn, konstruis pli ol 500 stalojn kaj multajn domojn, per kio ili efektivigis la planon “ĉiu grego havas stalon kaj ĉiu paŝtista familio havas domon”. Ili alkondukis akvon por irigacii paŝtejon, kulturebligis pli ol 3,000 muojn da fojnaj kampoj kaj fundamente ŝanĝis la staton ke brutbredadon decidus la naturo, tiel ke la nombro de brutoj estas 6-oble pli multa ol tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj amasoj de paŝtistoj serioze vive studas kaj vive

aplikas Maŭzedongpenson, tiel ke senĉese aperas novaj homoj kiuj tutkore laboras por la revolucio kaj kolektivo. Multaj komunistoj fariĝis pli viglaj kaj entuziasmaj.

En iu vintro, la regiono Nalati trafis sesdiurnan densan neĝon. Paŝtistoj kaj gregoj en malproksimaj profundaj montoj estis baritaj de neĝblovado. La vicsekretario de la partia filio de la unua brigado Manapu tuj organizis helpan grupon kaj iris tien. Transirante iun altan monton, la grupo troviĝis inter rokmuro kovrita de glacio kaj neĝo kaj profunda ravino kaj en ĉiu momento povis okazi lavango. Manapu iris plej antaŭe por trovi vojon. Post malfacila batalo en kvar diurnoj ili fine trovis la baritajn paŝtistojn kaj gregojn.






*Paŝtistoj de Banŝentu-brigado de la Meza Ĉajoŭ-flago de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio plibonigas sian bredadon de ŝafaro.*

### SEKA STEPO FARIĜIS OAZO

Antaŭvespere de la "1-a de Julio", naskiĝtago de la Partio, la stepon Bajjinvulan de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio regis sunbrilo kaj ruĝaj floroj prosperas inter verdaj herboj. Gregoj de bovoj kaj ŝafoj moviĝadas sub blankaj nuboj kaj ĉevaloj galopas sur la stepo. La paŝtistoj de la brigado Bajjinvula de la Sunid-a Dekstra Flago nove fosis la 27-an puton sur la stepo malabunda je akvo. En la lastaj jaroj la brigado fosis sume 27 putojn. Klara akvo fluis murmure en la stepon. Dank' al akiro de akvo, la paŝtistoj komencis ŝanĝi la nomadan vivon senĉese vagadi tien kie troviĝas akvo kaj herbo.

La brigado Bajjinvula estas brutobreda brigado kun plej malbonaj naturaj kondiĉoj en la tuta Flago. La stepo kun areo de pli ol 400 kvadrataj kilometroj estis preskaŭ tute kovrata de sablomontetoj kaj punktita de salaj kaj alkalaj kavegoj.

Por irigacii la stepon, la sekretario Taŭgaŭ de la partia filio de la brigado gvidis la paŝtistojn serĉi fontojn kaj ŝtonojn. Post penema batalado de 4 monatoj ili sukcesis fosi la unuan puton sur la stepo. En mallonga tempo de kelkaj jaroj la brigado fosis pli ol 20 putojn. La stepo ekhavis fon-



tojn de feliĉo kaj la seka stepo surmetis al si novan veston.

Sur la senlima stepo, la paŝtistoj de Bajjinvula plantis multe da arboj por bari venton kaj fiksi sablon. Ili konstruis ĉirkaŭmurojn kaj pli ol 130 muojn da fojnaj kampoj. La pasinta seka stepo nun fariĝis oazo.

### LA TIBETA POPOLO LERNAS DE DAĜAJ


Sur la tibeta altebenejo, Maŭzedongpenso gvidas la tibetan popolon en batalo de reformo de la naturo. En la pasinta vintro, siblis norda vento kaj ambaŭborde de Jalong-rivero iris intensa laborado. La vastaj amasoj de liberigitaj servutuloj de Hiangjang-komunumo de Najdong-gubernio respondis la alvokon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "lernu de Daĝaj en agrikulturo", ebenigis teron, forigis veprojn, transportis ŝtonojn. Bolis entuziasmo sur la laborejo.

La komunumo estis fondita en la jaro 1965. Sub la gvido de la sekretario de la partia filio de la komunumo Gesangdunĝu kaj post penema batalo

de tri vintroj kaj printempoj, la komunumanoj kreis pli ol 300 muojn da bonaj kampoj.

En la pasinta vintro la vastaj amasoj de Hiangjang-komunumo faris kvinjaran planon de transformo de la naturo. La unua tasko estis konstruo de irigacia sistemo. Komenciĝis la laboro de mont-hako por akvokonduko. Komunistoj gvidis la komunumanojn lukti kontraŭ ŝtonoj per ŝtalstangoj kaj pioĉoj. Por fosi kanalon sur rokmuro, junuloj organizis sin en sturmajn grupojn. Ili pendis en la aero ligite per ŝnuroj je la talio, boris truojn sur rokoj kaj enmetis dinamiton. Post malfacila batalo de 74 tagoj, ili konstruis sur montoj kanalon longan je pli ol 7 kilometroj kaj alkondukis la akvon el Jalong-rivero kaj efektivigis memfluan irigacion en la tuta komunumo.

En la lastaj jaroj, la vastaj amasoj de Hiangjang-komunumo paŝon post paŝo plibonigis la fizionomion de malriĉeco kaj postrestinteco kaj akiris sinsekvajn abundajn rikoltojn de agrikulturo. Ili vendis al la ŝtato multe da greno kaj senĉese plibonigis sian vivon.



*La distrikto Gieba de Najdong-gubernio en Tibeto akiris alian riĉan rikolton de sekalo sur granda areo.*



# Vizito al la Petrolkampo Daking

**E**N frua printempo, ni venis al la petrolkampo Daking.

## LA UNUA OLEPUTO DE LA PETROLKAMPO

Kun respekto en la koro ni vizitis la unuan oleputon de la petrolkampo Daking. Tiu puto estas borita de la Drilista Taĉmento 1205 sub la gvido de ĝia estro kamarado Vang Ginhi, antaŭ dek jaroj.

Kamaradoj de Daking rakontis al ni kortuŝajn farojn de kamarado Vang Ginhi dum la putoborado en tiu loko.

Tio okazis en printempo de 1960, kiam la petro-la industrio de nia lando ankoraŭ estis tre postĝinta. Kun la revolucia sentimento gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj por la ĉina popolo, kamarado Vang Ginhi rapidis de Jumen en Gansu-provinco al Daking por ekspluati la olekampon kun la drilista taĉmento 1205 sub sia gvido.

Tiutempe, la vasta stepo estis kovrita de neĝo kaj glacio, la cirkonstancoj estis tre malbonaj. Por ekspluati la olekampon, oni devis venki sennom-



*Por sekurigi la bormaŝinon, Ferulo Vang Ginhi kirlis kotakvon per sia korpo dum pli ol 3 horoj kaj haltigis olean ŝprucadon de la puto.*



*Laboristo jde la drilista taĉmento 1205 studas la filozofian verkon de Prezidanto Maŭ Pri Praktiko.*

brajn malfacilojn. Oni ne nur ne havis sufiĉe da ekipaĵoj, sed eĉ ne havis varman dormejon. Sed Vang Ginhi diris heroe: “Ni absolute ne devas retiriĝi antaŭ la malfaciloj. Por progresigi la aferon ni kreu la necesajn kondiĉojn, se ili ne ekzistas!” Ne havante sufiĉe da aŭtoj, li kaj la taĉmentanoj sub lia gvido transmovis la ekipaĵojn por drilado al la laborejo per tirado kaj ŝultroportado; mankis al ili akvo por bori puton, ili do fosis puton sur la frostita stepo per ŝpatoj kaj pioĉoj; kiam ili renkontis akvotralasan tertavolon dum la drilado, kaj la akvo en la puto estis elĉerpita, li do alvokis al la amasoj, ke ili alportu akvon per lavpelvoĵoj kaj sitejoj, el akvujo pli ol unu lion malproksima. Vang Ginhi kaj lia taĉmento finfine sukcesis bori la unuan oleputon de Daking-olekampo, kun la spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj.

“Li vere estas ‘ferulo’!” Lokaj popolanoj tiel laŭdis Vang Ginhi. Kaj la nomo Ferulo Vang disvastiĝis tra la petrolkampo Daking.

En sia malfacila batalado por ekspluati la olekampon, la Daking-anoj persistadas en viva studo kaj viva apliko de la brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko*, *Pri Kontraŭdiro* kaj la “tri popularaj artikoloj” kaj eltiris el ili saĝon kaj forton. En nur iom pli ol tri jaroj, ili jam sukcese konstruis unuaklasan olekampon de la mondo en loko, kie ne povas ekzisti granda olekampo laŭ aserto de burĝaraj “aŭtoritatuloj”, kaj faris grandan kontribuon por efektivigo de memprovizado de petrolo por nia lando.

En la jaro 1964, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ elmetis la alvokon: “**Lernu de Daking en industrio**”. La heroaj Daking-anoj pleniĝis de senkomparaj ĝojoj kaj kuraĝo kaj marŝas brave antaŭen laŭ la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ per ankoraŭ pli grandaj paŝoj! En la pasintaj dek jaroj, la olekampo senĉese disvolviĝis kaj nun ĝia skalo plivastiĝis ĝis 2.5-oblo kompare kun tiu de 1965 antaŭ la granda kultura revolucio; la produktokvanto de nafto kaj la kapablo de olerafinado





*Ĝang Hongĉi (la dua de maldekstre) kaj laboristoj kune solvas problemojn en teknika renovigo.*

ambaŭ duobligis. La tuta olekampo plenumis la difinitajn taskojn en la Tria Kvinjara Plano je du jaroj antaŭdate.

### LA DRILISTA TAĈMENTO 1205

Iutage, ni venis al la sidejo de la drilista taĉmento 1205. Tie troviĝis nur kelkaj moveblaj tabulaj dometoj, kiuj vidiĝis kiel dislokitaj fervojaj vagonoj sur la stepo kaj formis U-forman korton. Sur tabulo antaŭ la korto estis skribita instruo de Prezidanto Maŭ “sinapogo sur propraj fortoj” kaj “penema lukto en malfaciloj”. Ambaŭflanke de la trotuaro staris propagandaj nigratabuloj, sur kiuj publikiĝis artikoloj pri komprenaĵoj de laboristoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj deklaroj pri decidemo en lernado al Ferulo Vang. Nermalproksime de la korto alte staris ŝaktoskafaldo kaj senĉese bruegis tie la drilmaŝino.

Jaron post jaro la drilista taĉmento 1205 brave batalis por la disvolviĝo de la petrola industrio de la patrolando. En la pasintaj 10 jaroj, ili moviĝis jen tien jen aliloken sur la stepo de Daking, kunportante la ŝaktoskafaldon, la tutan kompletan ekipaĵon kaj la moveblajn tabulajn dometojn. Ili boris entute pli ol 390,000 metrojn, t. e. kvanto pli

ol kvinoble pli granda ol tiu de la tuta Ĉinio antaŭ la Liberiĝo. En la jaro 1966, antaŭenpuŝate de la Granda Proletara Kultura Revolucio, ili kreis rekordon en putoborado de 100,000 metroj en unu jaro.

Post akiro de la granda atingo, la drilista taĉmento 1205 daŭre luktas peneme en malfaciloj. En januaro de 1971, kiam tiel frosta estis la vetero ke glaciigis akvogutoj tuj je ilia ektuŝo de la tero, ili kreis unu post alia rekordojn de enboro de 570 metroj en unu deĵoro, 1030 metroj en unu tago kaj 8,700 metroj en unu monato kaj tiel renovigis la rekordojn de putoborado en vintro.

La drilista taĉmento 1205 tutkore servas al la revolucio kaj nenia malfacilo povas ĝin bari. Iutage en septembro de 1970, kiam ĝi estis instalanta tubon, subite falis la drilego kun pezo de pli ol 10 tunoj el alteco de dekelkaj metroj malsupren kun rapideco de 7-8 metroj en ĉiu sekundo, kaj serioza akcidento povus okazi en 2-3 sekundoj alportante perdon al ŝtataj posedaĵoj kaj morton al la laborantoj. En tiu momento, drilisto Gaŭ Ĝinjing estis sube. Spite al vivdangero, li faris unu paŝon antaŭen, per sia tuta forto puŝis la premtenilon precize al la aperturo de la puto, tiel ke la drilego haltis

du metrojn super lia kapo, kaj la ŝtataj posedaĵoj kaj la vivo de la kunbatalantoj estis savitaj.

Gaŭ Ginjing estas juna laboristo. En ordinara tempo, li diligente studas la brilajn “tri popularajn artikolojn” de Prezidanto Maŭ. Li ofte diris: “Prezidanto Maŭ instruas nin, ke ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo. Por fari revolucion, ni petrolaj laboristoj devas timi nek mal-facilojn nek morton!”

### LA PETROLA RAFINEJO DE DAKING

La petrolo rafinejo de Daking estas granda kaj moderna. Ĝi estis finkonstruita per niaj propraj fortoj en 1.5 jaroj en la komenca periodo de la ses-dekaj jaroj. Depost sia stariĝo, ĝi faris gigantan kontribuon al la disvolvado de petrolo-rafinado en nia patrolando.

Laboristoj rakontis al ni jenan historion: La ekipaĵoj de la Dua Atmosfer-vakua Distila Unuo de la rafinejo kun avangarda nivelo de la sesdekaj

jaroj superplenumis ĉiujare la produktan planon kaj havigis al la ŝtato grandan kvanton da riĉaĵo. Veninte en la periodon de la grandaj sepdekaj jaroj, laboristoj de tiu laborejo elmetis jenan demandon: “Kiel ebligi al la rafinejo fari pli grandan kontribuon al la ŝtato?” La laboristoj komencis varman diskutadon. Post profunda esploro ili kuraĝe elmetis revolucionan proponon por reformi la instalaĵojn de la dua unuo.

Sed iuj opiniis, ke “eĉ neniu ŝraŭbo povas esti tuŝita”, ĉar “definitiva estas la tipo de la ekipaĵo” de la “Dua Atmosfer-vakua Distila Unuo” kaj “ĝia produktopovo jam atingis la kulminon”. Laboristoj diris: “Prezidanto Maŭ instruas al ni, ke ‘en la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas; ili neniam restas sur la sama nivelo’. Do la asertoj pri la t. n. ‘definitiveco de tipo’ kaj ‘atingo de la kulmino en produkto’ estas kontraŭaj al materiisma

*Sub la gvido de komunistino Hjue Gujfang (la dua de maldekstre en la fronta vico), kiu iniciatis la unuan produktan brigadon de laboristaj familianoj en Daking-petrolkampo, la laboristaj familianoj akiris duoblan riĉan rikolton en revoluciigo de penso kaj produkto.*





dialektiko, tio spegulas metafizikan vidpunkton de la burĝaro.”

La revolucia komitato de la petrola rafinejo donis subtenon al la propono de la laboristoj pri reformo de la Dua Atmosfer-vakua Distila Unuo, fondis projektan grupon kun veterana laboristo Vang De-jun kiel grupestro. La projekta grupo alvokis al la amasoj, ke ili donu siajn proponojn kaj konsilojn, kaj faris pli profundan esploron. Post zorga projektado dum tri monatoj kaj streĉa laborado dum pli ol 40 tagoj por efektivigo de la projekto, finfine ili faris la avangardajn ekipaĵojn de tiu produkta unuo ankoraŭ pli avangardajn kaj altigis la produktan povon je 73%. La sukcesa reformo de tiu laborejo donis fortan puŝon al la disvolviĝo de la produkto de la tuta fabriko, kaj duobligis la produktokvanto de la senvaksigejo, redistilejo kaj platena reordigejo.

En la moderna petrola rafinejo ni vidis ankaŭ multajn fabrikejojn aplikantajn lokajn metodojn en produktado. La malgranda kemisterka fabriko funkciigata de familianoj de laboristoj de la rafinejo estas unu el ili. En la pasinteco, la uzita katalizilo de iu laborejo longe prezentiĝis kiel ĝenaĵo kaj laboristoj devis ĝin transporti per aŭtoj en akvuĵon for de la fabriko, por ke la kloro ellasita de ĝi ne venenu homojn kaj hejmbestojn. Nun, laboristaj familianoj uzas ĝin kiel materialon por produkti altefikan fosforan sterkon, kaj jam produktis grandan kvanton da tia sterko en la pasintaj kelkaj jaroj por la ŝtato.

Kaj krome ili starigis per siaj propraj fortoj ankaŭ fabrikojn de kandeloj, rerafinita lubriko uzita, sapoj, lampopiroj, medikamentoj ktp. Utiligante forĵetitajn gason, likvaĵon kaj rekrementon kiel materialon, ili produktas ĉiujare grandan kvanton da riĉaĵoj por la ŝtato kaj tiel faris novan kontribuon al la patrolando en konstruado de socialismo laŭ la principo multe, rapide, bone kaj ekonomie.

### LA DEVENO DE LA VILAĜO “PIONIRO”

La petrolkampo Daking havas trajtojn kaj de urbo kaj de kamparo. La laboristoj ĉefe okupiĝas pri industrio kaj samtempe ankaŭ iom pri agrikulturo kaj flankaj produktoj; iliaj familianoj ĉefe sin okupas pri agrikulturo kaj flankaj produktoj, kaj krome ankaŭ iom pri industrio. Vizitantoj al Daking ĉiuj diris: “La petrolkampo Daking estas kaj urbeca kamparo kaj kampareca urbo.”


En la pasintaj dek jaroj, la heroaj Dakinganoj starigis sur la stepo dekojn da viv-bazoj, kiuj kombinas industrion kun agrikulturo kaj urbon kun kamparo, utilas al produktado kaj faciligas la vivon. Kaj oni nomas ilin vilaĝoj de laboristoj kaj kamparanoj. La vilaĝo “Pioniro” estas unu el ili.

Tiu vilaĝo konsistas el unu centra vilaĝo kaj kelkaj loĝpunktoj nemalproksime ĉirkaŭ ĝi. Inter la centra vilaĝo kaj la loĝpunktoj estas zorge kulturataj ebenaj kampoj. En la centra vilaĝo sin trovas butikoj, lernejoj, grenvendejo, poŝtofiĉejo,

*La vastaj amasoj de Daking-aj laboristoj kaj iliaj familianoj prenas industrion kiel la ĉefan okupon kaj samtempe sin okupas pri agrikulturo, bestobredado kaj aliaj flankaj okupoj. Jen ili refoje akiris riĉrikolton de greno.*



# Ŝlosilo de esperantistoj por koni novan Ĉinion



*Abonoj kaj peradoj konvenigataj.  
Specimeno sendata senpage.*



dialektiko, tio spegulas metafizikan vidpunkton de la burĝaro.”

La revolucia komitato de la petrola rafinejo donis subtenon al la propono de la laboristoj pri reformo de la Dua Atmosfer-vakua Distila Unuo, fondis projektan grupon kun veterana laboristo Vang De-ĵun kiel grupestro. La projekta grupo alvokis al la amasoj, ke ili donu siajn proponojn kaj konsilojn, kaj faris pli profundan esploron. Post zorga projektado dum tri monatoj kaj streĉa laborado dum pli ol 40 tagoj por efektiviĝo de la projekto, finfine ili faris la avangardajn ekipaĵojn de tiu produkta unuo ankoraŭ pli avangardajn kaj altigis la produktan povon je 73%. La sukcesa reformo de tiu laborejo donis fortan puŝon al la disvolviĝo de la produkto de la tuta fabriko, kaj duobliĝis la produktokvanto de la senvaksigejo, redistilejo kaj platena reordigejo.

En la moderna petrola rafinejo ni vidis ankaŭ multajn fabrikejojn aplikantajn lokajn metodojn en produktado. La malgranda kemisterka fabriko funkciigata de familianoj de laboristoj de la rafinejo estas unu el ili. En la pasinteco, la uzita katalizilo de iu laborejo longe prezentiĝis kiel ĝenajo kaj laboristoj devis ĝin transporti per aŭtoj en akvujon for de la fabriko, por ke la kloro ellasita de ĝi ne venenu homojn kaj hejmbestojn. Nun, laboristaj familianoj uzas ĝin kiel materialon por produkti altefikan fosforan sterkon, kaj jam produktis grandan kvanton da tia sterko en la pasintaj kelkaj jaroj por la ŝtato.

Kaj krome ili starigis per siaj propraj fortoj ankaŭ fabrikojn de kandeloj, rerafinita lubriko uzita, sapoj, lampopiroj, medikamentoj ktp. Utiligante forĵetitajn gason, likvaĵon kaj rekrementon kiel materialon, ili produktas ĉiujare grandan kvanton da riĉaĵoj por la ŝtato kaj tiel faris novan kontribuon al la patrolando en konstruado de socialismo laŭ la principo multe, rapide, bone kaj ekonomie.

### LA DEVENO DE LA VILAĜO “PIONIRO”

La petrolkampo Daking havas trajtojn kaj de urbo kaj de kamparo. La laboristoj ĉefe okupiĝas pri industrio kaj samtempe ankaŭ iom pri agrikulturo kaj flankaj produktoj; iliaj familianoj ĉefe sin okupas pri agrikulturo kaj flankaj produktoj, kaj krome ankaŭ iom pri industrio. Vizitantoj al Daking ĉiuj diris: “La petrolkampo Daking estas kaj urba kamparo kaj kampareca urbo.”

En la pasintaj dek jaroj, la heroaj Dakinganoj starigis sur la stepo dekojn da viv-bazoj, kiuj kombinas industrion kun agrikulturo kaj urbon kun kamparo, utilas al produktado kaj faciligas la vivon. Kaj oni nomas ilin vilaĝoj de laboristoj kaj kamparanoj. La vilaĝo “Pioniro” estas unu el ili.

Tiu vilaĝo konsistas el unu centra vilaĝo kaj kelkaj loĝpunktoj nemalproksime ĉirkaŭ ĝi. Inter la centra vilaĝo kaj la loĝpunktoj estas zorge kulturataj ebenaj kampoj. En la centra vilaĝo sin trovas butikoj, lernejoj, grenvendejo, poŝtofiĉejo,

*La vastaj amasoj de Daking-aj laboristoj kaj iliaj familianoj prenas industrion kiel la ĉefan okupon kaj samtempe sin okupas pri agrikulturo, bestobredado kaj aliaj flankaj okupoj. Jen ili refoje akiris riĉrikolton de greno.*



kuracejo, infanĝardeno, banejo, barbirejo, riparejoj de radioriceviloj, bicikloj kaj aliaj, laborejoj por fari farunon, oleon, fabkazeon, sojon kaj vinagron, kaj ankaŭ traktorejo, meteostacio k.a.

Kiu el tiuj kiuj unuafoje vizitis la vilaĝon "Pioniro" povas imagi al si, ke antaŭ dek jaroj tie estis dezerta stepo frekventata de lupoj kaj kovrata de neĝo! Tiutempe, sur la senŝirmeja stepo, en frosto de kelkdek gradoj sub nulo, la petrolaj laboristoj pene batalis tage kaj nokte kun firma decido konkeri la grandan olekampon. Stimulate de ilia heroa spirito, familianoj de la laboristoj diris: "Kiel ajn grandaj estas la malfaciloj, ni nepre partoprenos la konstruadon de Daking por fari kontribuon al la revolucio!"

Onklino Hjue Gujfang, kun aĝo de ĉ. 50 jaroj, firme decidis kulturebligi virgan teron sur la stepo gvidante aliajn kvar virinojn. Dorsportante litajojn, kun ŝpatoj sur la ŝultro, ili venis al la stepo, starigis tendon kaj ekloĝis tie. Antaŭ tagiĝo, ili jam ellitiĝis kaj komencis fosadi teron sur la stepo, spite al sabloventego, kaj tiamaniere ili bruligis la unuan revolucionan torĉon de la familianoj de laboristoj de Daking. Organizigis unu post alia taĉmentoj de laboristaj familianoj. Ili batalis ŝultron ĉe ŝultro kun la petrolaj laboristoj, kulturebligante pecon post peco da virga tero kaj paŝtante arojn da bovoj kaj ŝafoj. Ili konstruis per siaj propraj manoj multajn domojn kaj starigis multajn viv-bazojn de petrolaj laboristoj — vilaĝojn de laboristoj kaj kamparanoj. Ankaŭ la vilaĝo


"Pioniro" stariĝis tiamaniere. Ili konstruis tie domojn kun totala plankareo de ĉirkaŭ 30,000 kvadrataj metroj kaj tiamaniere solvis ne nur la problemon de loĝado, sed ankaŭ ebligis fondon de tri lernejoj, unu kuracejo kun 50 malsanulaj litoj, unu traktorejo kaj kompleto da servaj aranĝoj por viv-bezonoj.

En la 7-a de majo de 1966, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **"Kun laborado kiel sia ĉefa tasko, laboristoj devas samtempe lerni ankaŭ militajn aferojn, politikon kaj kulturon. Ili devas ankaŭ fari movadon de socialisma eduko kaj kritiki burĝaron. En loko, kie ekzistas necesaj kondiĉoj, ekzemple en la petrolkampo Daking, ili ankaŭ devas okupiĝi pri agrikultura kaj flankokupa produktado."** La instrukcio de Prezidanto Maŭ donis tre grandajn instruon kaj kuraĝigon al la laboristoj kaj iliaj familianoj loĝantaj en la vilaĝo "Pioniro" kaj ĉiuj aliaj viv-bazoj de Daking. Kun la revolucia spirito peneme luktadi en malfaciloj, ili senĉese faris kontribuojn al la disvolviĝo de la petrolo industrio kaj kulturebligis pli ol 8,000 muojn da virga tero kaj kolektive bredis nombron da bovoj, ŝafoj, ĉevaloj kaj porkoj. En la komenco, Hjue Gujfang kaj la aliaj 4 virinoj havis nur 5 fosilojn por kulturebligi virgan teron, sed nun ili jam havas 10 traktorojn, 2 kombajnojn, 1 aŭton kaj nombron da aliaj agrikulturaj instrumentoj. Sinapogante sur propraj fortoj, ili sukcesis fondi sian bazon kaj akiris riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj.

*Ili estas honore nomataj "feraj junulinoj", bone zorgantaj oleputojn.*







*Laboristoj pliproduktas nafton per potenca premforto.*

# La Petrolminejo Jumen en Lerno de Daking

ŜI HUANĈUN

**L**A petrol-minejo Jumen sur la dezerto de nord-okcidenta altebenejo estas la plej maljuna petrol-bazo de nia lando.

Dank' al lernado de Daking kaj persisto en principo direkti produktadon kaj konstruadon per Maŭzedongpenso, tiu maljuna minejo rejuniĝis kaj ĉie regas prospera vigeleco.

## FORTA TRUPO DE LABORISTOJ

Laboristoj de la petrol-minejo Jumen ofte rememoris, kiel kamarado Vang Ginhi siatempe adiaŭis

Jumen por iri al Daking. En marto de 1960, post ricevo de sciigo pri transposteniĝo, kamarado Vang Ginhi tuj sendis siajn pakajojn al la fervoja stacio kaj ekveturis per trajno kune kun siaj kunbatalantoj portante kun si verkojn de Prezidanto Maŭ. En la malfacilaj tagoj de konstruado de Daking-olekampo sur la stepo, kamarado Vang Ginhi montris sin timanta nek malfacilojn nek morton, tial oni nomis lin Ferulo.

En la amasa movado de lerno de Daking, petrolaj laboristoj de Jumen decidis lerni de la Ferulo.

Ili malestimis ĉian ajn malfacilon kaj danĝeron kaj iris tien kie ili estis bezonataj. De multaj jaroj la minejo elkulturis nombrojn post nombro da petrolaj laboristoj por la patrolando. La nombro de laboristoj, kiuj transposteniĝis aliloken por ekspluati kaj konstrui novajn oleokampojn, superis kvar oblojn de tiuj estantaj en la minejo. La transpostenigitaj laboristoj neniam plendis pro malfaciloj kaj tre bone plenumis la taskon, ĉu laborante sur senhoma stepo aŭ sur dezerto.

En 1970, granda nombro da laborantoj kaj ekipaĵoj de Jumen-minejo estis sendita al aliaj lokoj, sed la produkta tasko de nafto difinita de la ŝtato por la minejo pliiĝis je 14% kompare kun tiu de 1969. Antaŭ la grandaj malfaciloj, la petrolaj laboristoj de Jumen lernis la revolucionan spiriton de Daking-aj laboristoj kaj elmetis heroan sloganon: “ne peti helpon de aliaj sed mem venki malfacilojn”. Por kovri nesufiĉon de laborfortoj, ili pene laboris kaj faris teknikan renovigon por ke unu persono plenumu la taskon de pluraj laborspecoj kaj homoj. Por solvi la problemon de nesufiĉeco de ekipaĵoj kaj maŝinpartoj, ili faris ilin per siaj propraj manoj.

Sub la nutrado de Maŭzedongpenso, aperis multaj avangardaj personoj de “Ferulo”-tipo en la petrol-minejo Jumen, inter kiuj sin trovas veterana laboristo Niu Tigjun de la minejo Jumen, aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso de Gansu-provinco. Forigo de glacio en subtera kanalo estas rigardata kiel “eltiri denton el tigra faŭko”. Foje, Niu Tigjun kun alia eniris en subteran kanalon altan nur je pli ol 1 metro por forigi glacieron. Pro maldenseco de aero en la kanalo, post nelonga laborado ili jam sentis al si kapdoloron kaj vomemon. Sed ili persistis iri antaŭen rompante glacieron. Post forigo de glacio de pli ol 400 metroj ili venis al loko, kie la kanalo estis preskaŭ tute ŝtopita de glacio. Tie estis plej danĝera parto.

Se la glacio estos rompita, la akumulita glacio kaj akvo furioze altorentos kaj eble forportos ilin, se ili iom malrapidos. Spite al vivdanĝero Niu Tigjun plenforte batis glacieron per fera martelo. La glacio rompiĝis kaj la glaciakvo torente fluis malsupren. Kiam ili kuris al elirejo de la kanalo, la akvo jam leviĝis ĝis ilia kolo. Post brava kaj obstina batalo ili fine elturnis sin el la danĝero.

#### REFORMI MALJUNAN MINEJON PER SPERTO DE DAKING

La petrol-minejo Jumen jam havas ekspluatitan historion de dekoj da jaroj. Pro serioza detruado de la kuomintangaj reakciuloj en la pasinteco, en tiu minejo iam aperis malaltiĝo de produktokvanto



*Laboristoj riparas forlasitan oleputon.*



de nafto, malaltiĝo de premforto en oletavoloj kaj leviĝo de procento de akvo en nafto.


Ĉu oni povas ŝanĝi tiun situacion? Lerninte sperton de laboristoj de Daking, kiuj direktis ekspluaton de olekampo per *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiro*, la laboristoj de Jumen kombinis revolucionan spiriton kun scienca sinteno, aktive reformis la maljunan minejon kaj atingis grandan sukceson. Ili paŝon post paŝo stabiligis la premforton en oletavoloj kaj la procenton de akvo en nafto kaj levis la produktokvanton. Kun pli profunda disvolviĝo de la amasa movado de lerno de Daking, “mortaj oleputoj” unu post alia turniĝis en vivajn putojn, “akvaj tavoloj” en oleajn, “senoleaj areoj” en olehavajn kaj “malaltproduktaj oletavoloj” en altproduktajn. La minejo reakiris sian junecon.

La disvolviĝo de Dongfeng-olekampo de Jumen estas unu el la ekzemploj, ke laboristoj reformis maljunan olekampon, lernante sperton de Daking kaj aplikante verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiro*. Antaŭ la Liberiĝo, la olekampo suferis seriozan detruadon pro raba ekspluato de la usonaj kaj Ĉiangkajŝek-aj reak-



ciuloj. Post la Liberiĝo, sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, la laboristoj rekonstruis la olekampon, tiel ke ĝi akiris grandan disvolviĝon. Sed malhelpo de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj eraraj ekspluatataj projektoj de kelkaj burĝaraj “specialistoj” kaj “aŭtoritatuloj” kaŭzis malboniĝon de la olekampo: iuj memŝprucantaj putoj ne plu ŝprucis kaj malaltiĝis la produktokvanto de nafto. Tiam iuj “specialistoj” kaj “aŭtoritatuloj” senbride dissemis la diron ke “la minejo jam elĉerpiĝis kaj la latentaj fortoj jam eluziĝis”.

Ĝuste en tiu tempo, atingis Jumen la sperto de Daking-aj laboristoj en ekspluato de olekampo per brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ. La vastaj amasoj de laboristoj ricevis grandan edukon kaj inspiron. Ili ripetade studis *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiro*, serioze analizis staton de la minejo kaj fine venis al la konkludo, ke la minejo ne kadukiĝis, sed havas grandan latentan povon por produktado. La malboniĝo de la minejo estas kaŭzita de senŝanĝa imitado de fremdlandaj spertoj, kiuj apartiĝis de realo de Jumen. La petrolaj la-

#### La Jumen-a Olerafinejo



*Olea kolektejo de Dong-  
feng-olekampo de Jumen*



boristoj faris decideman batalon kontraŭ la burĝaraj “specialistoj” kaj “aŭtoritatuloj” kaj refutis iliajn absurdaĵojn per praktikaj agadoj. Iu loko oriente de oleputo 53 de Dongfeng-olekampo estis rigardata en la pasinteco kiel “senolea areo”. Analizinte grandan nombron da materialoj, laboristoj konkludis, ke sub tiu loko sin trovas riĉa oletavolo. Ili do komencis ripari la forlasitajn putojn, tiel ke la lastaj ne nur produktis oleon sed ankaŭ povas memŝpruci. Krome, ili konstruis nombron da novaj putoj en tiu loko, kaj ĉiu el ili povas produkti oleon. La “senolea areo” turniĝis en olehavan regionon, kio aldonis novajn fortojn al la maljuna minejo.

Tiajn ekzemplojn oni povas trovi ankaŭ en Ŝijoŭgoŭ, Jaerhia kaj aliaj minejoj.

### **MARŜO AL SOCIALISMA NOVTIPA MINREGIONO**

Sur la dezertejo proksime de Jumen-minejo aperis pecon post peco verdejoj. La ebenaj kampoj, senlimaj forstaj zonoj, vicoj post vicoj da ordaj kaj puraj loĝdomoj, hospitalo, lernejoj, vendejoj ornamis tiujn verdejojn similajn kaj al urbo kaj al



kamparo. Tie, printempe plantidoj verdas, somere tritiko ondiĝas kaj vintre kukumo floras kaj tomatoj abunde pendas sur la branĉoj en vitraj domoj de la kultivejoj. Jen estas nove fondita prospera bazo de agrikultura kaj flankokupa produktado de la petrol-minejo Jumen.

Antaŭ 1957, oni faris grandan projekton pri konstruado de Jumen en "petrolan urbon". Se oni farus laŭ tiu plano, ne nur multaj monrimedoj de la ŝtato estus malŝparitaj, sed ankaŭ pliiĝus nombro de la urbaj loĝantoj kaj plipeziĝus ŝarĝo sur kamparo.

En 1958, sub la brilo de la tri ruĝaj standardoj de la ĝenerala linio de la Partio por konstrui socialismon, granda antaŭensalto kaj popola komunumo, la kadroj kaj laboristoj de la petrol-minejo Jumen komencis kulturebligi virgan teron. En la amasa movado de lerno de Daking plialtiĝis ilia aktiveco en disvolvo de agrikultura kaj flankokupa pro-

duktado. En la pasintaj pli ol dek jaroj, sur dezerto kaj salalkala tero en malaltaĵoj de Kilian-montaro alta je pli ol 2,000 metroj super la mara nivelo, ili kulturebligis grandan kvanton da virga tero, konstruis kanalon longan je pli ol 50 kilometroj, plantis pli ol 300,000 arbidojn por bari venton, starigis 6 agrikulturajn kaj flankokupajn produktajn bazojn kaj 25 loĝpunktojn, produktis 50,000,000 ĝinojn da greno kaj grandan nombron da legomoj, oleaĵoj kaj viandoj, kaj la familianoj de laboristoj efektivigis memprovizon de greno. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, krom livero de milionoj da ĝinoj da greno al la ŝtato por agrikultura imposto, ili rezervis kvanton da greno kiu sufiĉas por provizi ĉiujn kadrojn kaj laboristojn por unu jaro. Nun la vastaj amasoj decidis reformi paŝon post paŝo la "petrolan urbon" Jumen en novan socialisman min-regionon de kombiniĝo de industrio kun agrikulturo kaj de urbo kun kamparo, favoran al produkto kaj vivo.

*Jumen-petrolmineja kultivejo jam atingis pomuan produktokvanton de 600 ĝinoj da tritiko.*



# Edukado en Kombino kun Produkta Laboro

Lernantoj de la elementa lernejo Ĝangdong plektas diversajn korbojn en postlecionaj horoj.





Uguraj ruĝgardianetoj de Hingiang lernas de avo Kurban Tulum kolektadon de kotono.









Lernantoj de la Unua Mezlernejo de Gutian de Fugian-provinco observas sur la kampo de sia lernejo kreskadon de viŝila kukurbo (*Luffa cylindrica*), post apliko de agrikultura medikamento.

*Dekstre supre:* La Unua Elementa Lernejo de Ĉuangjing-distrikto de la urbo Gilin starigis Pilo-fabrikon de Ruĝaj Gvardianetoj. Jen la lernantoj kontrolas la kvaliton de pilo.

*Dekstre malsupre:* Instruisto de la mezlernejo Juegeguang en Pekino donas al la lernantoj lecionon en ligo kun la produkta praktikado de la fabriko funkciigata de la lernejo.







Lernantoj de la Janbian-a Kore-nacia Aŭtonoma Subprovinco lernas fari meteo-esploron.

# Instruistoj kaj Lernantoj Parolas pri la Eduka Revolucio

**L**ASTATEMPE, legantoj de nia gazeto skribis al la redakcio, ke ni raportu pri la eduka revolucio en Ĉinio. Kiel vi estas informitaj, depost 1970 la novaj studentoj en Kinghua-universitato kaj aliaj altaj lernejoj en nia ĉefurbo devenis de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj ĉe industriaj, agrikulturaj kaj armeaj postenoj. Ili havas praktikan sperton de klasa batalo, produkta batalo kaj sciencaj eksperimentoj kaj estas farantaj dum studo siajn kontribuojn en administrado kaj reformado de altaj lernejoj. Ĉi tie ni prezentas al la legantoj parolojn de du studentoj kaj du instruistoj de Kinghua-universitato pri problemoj kaj iliaj komprenaĵoj en la eduka revolucio.

## Guj Jupeng, studento de la mekanika fakultato:

Por bone plenumi la taskojn de studo kaj administrado kaj reformado de universitato, ni studentoj devenintaj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj devas persisti en lernado dum praktiko kaj partopreno de fizika laboro, estas grave por ni lerni utilajn fakajn sciojn, sed pli grave estas altigi nian politikan konscion.

Foje, nia instruisto donis al ni lecionon pri hidrostato en ligo kun la olea linio de kranka formiga ilmaŝino de hidrostatika transmisio. La instruisto desegnis per koloraj kretoj diagramon de olea linio sur la nigra tabulo kaj diris al ni, kion la koloroj simbolas. Poste li pacience klarigis al ni pri la temo. Ni aŭskultis kun streĉa atento, sed ni ne povis bone kompreni. Videble la klarigo pri la ilmaŝino per la desegno ne povis nin helpi, ni do kritikis, kune kun la instruisto, la reviziisman edukan linion karakterizatan per apartigo de la scioj en libroj disde praktiko por elimini ĝian malbonan influon, kune iris al maŝinfabrika por fari instruadon ĉe la loko de praktiko kaj ni petis

laboristojn doni al ni lecionojn. Post lernado de malpli ol unu semajno, la lernantoj ĉiuj jam sentis, ke estas ne tiel malfacile ellerni hidrostaton.


Poste, ankaŭ kiam en la fabriko de la universitato instruisto donis al ni lecionon en ligo kun la projekto de alezmaŝinoj, la lernantoj kaj instruisto de nia klaso vizitis 8 fabrikojn, okazigis 11 kunsidojn, faris enketon pri dekelkaj specoj de alezmaŝinoj en- kaj ekster-landaj kaj partoprenis laboradon en la fabrikoj. Dum tiu aktivado, ni analizis la ekzistantajn mankojn de la importitaj ilmaŝinoj.

Ekzemple, unu el ili havas la mankon de trograndeco, tropezeco kaj teknologia malmmoderneco, kiu delonge jam ne konformas al la bezonoj de la rapidega disvolviĝo de niaj industrio kaj agrikulturo.

Iu alia alezmaŝino produktita de kapitalisma lando havas buntan kaj belan keston de elektra direktado, tamen ne tiel taŭgan al la celo. Ĝia kesto de la ĉefa ŝafto dividiĝas en supran kaj mal-supran partojn, kaj dum la manipulado laboristo devas uzi pli ol dek ansojn supre kaj malsupre, tia unutaga laborado povas elĉerpi lian tutan energion.

Kial la ilmaŝinoj havas tiujn mankojn? La fundamenta kaŭzo kuŝas en putreco de la kapitalisma socisistemo. La kapitalistoj rigardas la laboristojn kiel akcesoraĵojn kaj longigitajn ansojn de ilmaŝinoj kaj absolute ne zorgas pri ilia vivo. Ĝuste kiel Engels diris en sia kritiko al la burĝaro, ĝi "ne rigardas la laboristojn kiel homojn, sed nur 'manojn'". La penso direktanta ilian projektadon estas kiel gajni monon kaj ekspluati la laborantajn popolanojn.





*Kamarado Guj Jupeng*



*Kamarado Ĝang Fugju*

Surbaze de analizado kaj kritikado, ni faris seriozan lernadon pri utilaĵoj eksterlandaj por “utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio”.

Ni faris enketon ankaŭ pri enlande produktitaj ilmaŝinoj, inter kiuj sin trovas ilmaŝinoj de avangarda nivelo kreitaj de nia laborista klaso kaj ankaŭ novaj ilmaŝinoj projektitaj kaj fabrikitaj de malgrandaj fabrikoj de loĝkvartaloj laŭ bezonoj de la kamparo.

Tiu aktivado ebligis al ni klare distingi la du malsamajn liniojn en projektado unu de la alia kaj rompi la misterecon de projektado. Reveninte al la universitato, ni elmetis dekkelkajn projektojn de alezmaŝino, laŭ la efektivaj bezonoj de la socialisma konstruado. Kaj la lernantoj kaj instruisto diris: “En tiu ĉi enketado, ni lernis multe da scioj de praktiko kaj teorio, sed pli grave estas, ke ni ellernis la penson kaj metodon de la proletaro en projektado kaj ricevis profundan edukon. Tio ĉi estas absolute neakirebla en klasĉambro.”

#### **Ĝang Fugju, studento de la kemiindustria fakultato:**

Nur dank’ al la prizorgo de Prezidanto Maŭ, mi venis de nia vilaĝo en la universitaton por studo. Kiel mi ĝojis pro tio. Mi pensis, ke havante tiel

bonan ŝancon mi nepre bone lernados. Ĉar mi timis pri perdo de tempo por la studado, mi ne emis partopreni postlecionajn aktivadojn kaj fizikan laboron por lerni agrikulturon. Kaj tiamaniere, mi dronis en lernado tuj je la komenco, eĉ oferante ripozon en dimanĉo. Forpasis kelkaj semajnoj. Kvankam mi forte streĉis mian energion, tamen mi povis bone plenumi la lernadon nek pri matematiko, nek pri fremda lingvo, nek pri kemio. Mi tre maltrankviliĝis kaj eĉ sentis timon al la malfaciloj.

Ĝuste en tiu tempo, la lernejo organizis nin por ĝustigi la lernostilon kaj nian penson. Mi ekmemoris pri nia vizito al la ekspozicio pri la batalo inter la du linioj en Kinghua-universitato baldaŭ post mia veno al la universitato. La ekspozicio malkaŝis al ni, ke en la pasinteco, la burĝaj reakciaj “aŭtoritatuloj” malestimis studentojn devenintajn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, asertante ke “ili estas malsaĝaj kaj ne povas bone lerni” ktp. Tiam mi tre indigniĝis pro tio kaj firme decidis bone plenumi la lernan taskon por glorigi la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn. Sed kial nun mi ŝanceliĝas je renkonto de la malfaciloj? Tiu retrorigardo alarmis min.



*Kamaradino Ĉen Ŝujlian*

Kaj mi ankaŭ rememoris la suferplenan historion de mia familio: En la malnova socio, neniu el miaj familianoj de multaj generacioj scipovis legi. Mia patro paŝtis ŝafojn por bienulo kaj devis fari registrajn strekojn surmure por memori la labortagojn. Hodiaŭ la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elektis kaj sendis min al la universitato por lernado, tio estas rajto al ili donita de Prezidanto Maŭ. Tiu rajto estas malfacile gajnita. Tial, bone plenumi la lernadon ja ne estas afero persona, sed koncernas al la problemo bone teni la regpotencon en kulturo por la laboristaro kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj firmigi la diktaturon de la proletaro. Ĉe tio eklumiĝis mia penso kaj mi decidis meti en la unuan lokon la elstarigon de la proletara politiko, por ke ĝi movu la lernadon.

De tiam mi partoprenis diversajn aktivadojn de la eduka revolucio kun granda entuziasmo kaj pliboniĝis iom post iom mia lernado de ĉiuj lernobjektoj.

**Ĉen Ŝujlian, instruistino de la aŭtomatiga fakultato:**

Mi estas instruistino de fundamenta matematiko. En junio de la pasinta jaro, kiam la unuaj novaj



*Kamarado Ĉen Boli*

laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj venis en la universitaton, mi suriris la instruon podion kun granda entuziasmo. Tamen ses el la 10 lecionoj faritaj de mi efikis ne bone. La lernantoj demandis min: “Por kio utilas via instruado pri tio? Ĝi estas tro abstrakta. Viajn vortojn ni ne bone komprenas, kaj niajn demandojn vi ne bone komprenas.” Tio fakte malkaŝis la kontraŭdiron inter la gvida penso, enhavo kaj metodo de la malnova instruado en unu flanko kaj la postuloj kaj leĝo de konado de la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj en la alia. Nia instruado ankoraŭ fundamente restis en la stato de starigo de demandoj, logika rezonado kaj dono de klaraj konkludoj. Tio konformis al la postuloj de la antaŭa reviziisma eduka linio por elkulturo de intelektuloj, apartigitaj de la proletara politiko, de la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj kaj de la praktiko de produktado. Nun aliĝis la objektoj de edukado. La celo de la edukado estas elkulturi kapablulojn por la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado kaj la kriterio de la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj por kontrolo de la instruado estas la praktiko. Ilia opinio pri la “abstrakteco” de mia instruado ĝuste malkaŝis tion, ke la influo





*Lektoro direktas lernadon de studentoj.*

de la reviziisma eduka linio ankoraŭ ne estas eliminata.

Por helpi min en altigado de la politika konscio kaj venko de la malfaciloj en instruado, la lernantoj kun profunda proletara sento studis kune kun mi la instruojn de Prezidanto Maŭ, ke **“eduko devas servi al la proletara politiko; eduko devas kombiniĝi kun produkta laboro”** ktp. kaj kritikis la reviziisman edukon linion. La studo plifortigis mian memfidon pri efektivigo de la revolucia eduka linio de Prezidanto Maŭ.

Mi pensis, ke por ke la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj komprenu mian instruadon, unue mi devas kompreni kaj bone koni ilin kaj reformis la malnovajn gvidan penson kaj metodon en instruado laŭ la bezonoj kaj leĝo de konado de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

En la komenco ni opiniis, ke iuj el la lernantoj ne scipovas fari operaciojn; sed post zorga analizo ni trovis, ke ili tamen havas siajn proprajn kutimojn kaj metodojn en kalkulado, sed ili ne scipovas esprimi kaj fari kalkuladon per matematikaj operacioj. Bonan rezulton ni povos atingi, nur se ni altigos ilin sur ilia bazo. Ni instruistoj do unue lernis de ili iliajn kalkulajn metodojn por ilin kom-

preni. Ekzemple, kiam ni instruas matematikon en ligo kun elektrista laboro, ni unue petis lernanton veteranan elektriston fari kalkulon. Li faris kalkulon enmense, analizante la cirkviton, kaj fine donis al ni la solvon. Poste, ni petis lin diri la procezon de lia penso kaj helpis lin tion esprimi per matematika operacio. Tiamaniere ni komprenigis al la lernantoj, ke matematiko estas afero neniom mistera kaj ebligis al ili ellerni starigon de operacioj.

#### **Ĉen Boli, instruisto pri veldado:**

Laŭ la instruado de Prezidanto Maŭ, studentoj de politeknikoj devas labori en eksperimenta fabriko, fari eksperimentojn en laboratorioj kaj ankaŭ kontakti kun la realo de la socio. En la pasinta jaro, ni tri instruistoj de veldado kaj lernantoj kun ĝenerala scio iris al iu fabriko por fari praktikan instruadon pri velda teknologio. En tiu tempo, mi ne havis sufiĉan memfidon en sukcesa instruado de tiu leciono. Mi pensis, ke la plejparto de la lernantoj de tiu klaso neniam faris veldadon kaj iuj el ili eĉ ne vidis tion. Nun estas postulate, ke en la mallonga tempo de nur du monatoj la lernantoj atingu la nivelon de memstara manipulado kaj krome ankaŭ posedu certan teorion scion por analizi kaj ellabori produktan teknologion. Ĉu tiu tasko estas plenumbla?

La efektiva rezulto tamen estis multe pli bona ol la atendita.


En la lasta semajno dum nia aktivado, la fabriko faris ekzamenon por kontroli la lernadon de la studentoj. Ni dividis ilin en grupojn el 6-7 homoj por plenumi la taskon de fari de relative grandaj produktaĵoj. Ordinare tia produktaĵo estas farita endome per mekanika ekipaĵo. Ĉifoje, la lernantoj devis fari la laboron eksterdome ne per tia ekipaĵo, mem elabori teknologion kaj fari la veldadon kaj muntadon por ilin produkti. Ĉiu el la grupoj fine plenumis sian produktan taskon en du tagoj. Post ekzamado de la produktaĵoj, la fabriko trovis, ke ilia kvalito atingis la teknikan postulon por esti liverataj. Tiu nivelo ja estis neatingebla por diplomita studento de malnova universitato, eĉ post ses-jara lernado!

Kial oni povis atingi tian sukceson? Ĉefe pro tio, ke gvidantoj kaj vastaj amasoj de laboristoj de la fabriko aktive partoprenis la edukon revolucion. Tuj post nia alveno al la fabriko, tiu ĉi jam elektis 6 spertajn laboristojn kaj unu teknikiston por formi "grupon de laboristoj-instruistoj" por doni lecionojn al la studentoj. Kaj kiam la studentoj venis en la laborgrupojn de la fabriko, ĝia gvidan-

taro asignis po 1 spertan laboriston al la studentoj por ilin helpi. Oni senhezite lasis la studentojn sin hardi en produktado. Laboristoj diris: "Bone fari edukon revolucion ja estas propra afero de ni laboristoj, kaj elkulturado de niaj propraj studentoj estas glora politika tasko al ni asignita de Prezidanto Maŭ. Ni nepre ĝin plenumos!"

Foje, ni devis instali kaj veldi produktaĵojn kun grandeco de korbopilka placo kaj alteco de trietaĝa domo. Ni invitis kelkajn veteranajn laboristojn, ke ili donu lecionon kune kun ni. Antaŭe iuj el ili faris tian laboron sur neĝokovrita tero en la Nordoriento de nia lando, aliaj en sablovento en la Nordokcidento kaj ankoraŭ aliaj en varmega vetero en suda Ĉinio. Ĉiu el ili havis sian valoran riĉan sperton kaj ĉio kion ili preparolis estis kompreno el praktikado. Ili ne nur bone klarigis la ĝeneralan leĝon en produktado de tiu objekto, sed ankaŭ parolis pri la aparte atentindaj punktoj de instalado kaj veldado en diversaj specialaj kondiĉoj. Ili klarigis konkrete, vivece kaj facile kompreneble por la studentoj.

Nun ni jam starigis rilatojn en diversaj formoj kun pluraj fabrikoj por fari tian instruon en longa periodo.



*La laborista studento kun praktika sperto riparis importitan maŝinon, kiu estis forlasita en la mekanika fakultato jam 13 jarojn.*



# Novaj Fruktoj en la Eduka Revolucio

**E**N la eduka revolucio de nia lando, la instruistoj kaj lernantoj prenas studon de fakaj scioj kiel la ĉefan taskon kaj krome lernas aliajn. Ili lernas ne nur kulturalan scion, sed ankaŭ tiun pri agrikulturo kaj industrio kaj fondis bazojn por fari produktan laboron kaj sciencajn eksperimentojn en kombino de eduko kun lernado. Jen ni raportas al vi du fragmentojn pri la sukcesoj en la eduka revolucio.

## POR EFEKTIVIGI ELEKTRIGON DE KAMPARO

En laborejo de la Ĉina Sepa-Maja Lernejo de Ŝanhajo, oni estis donanta al lernantoj lecionojn pri bazaj scioj de industrio. Starante ĉirkaŭ du elektraj motoroj, lernantoj absorbite aŭskultis la lekcionon de laboristo-instruisto Vu. El la du motoroj unu estas malgranda kaj altefika produktaĵo de nia lando, kaj la alia — malnovtipa, peza kaj malaltefika. Majstro Vu diris: Antaŭ la Liberiĝo la motoroj en nia lando ĉiuj estis importitaj, tiam niaj produktaj instrumentoj estis tre primitivaj, oni laboris per la manoj en irigacio, ŝarĝo kaj malŝarĝo kaj fosado de karbo. Post la Liberiĝo, la laborista klaso de Ĉinio iras la vojon de sinapogo sur propraj fortoj en disvolvo de industrio, projektis kaj produktis multajn novtipajn motorojn por subteni la socialisman konstruon. Sed la renegato Liu Ŝaŭki, por restaŭri kapitalismon en Ĉinio, plenenergie distrumpetis “filozofion de sklaveco antaŭ fremduloj” kaj oponis kontraŭ disvolvo de nia propra industrio de elektraj motoroj. Ni nepre kritikis lian kontraŭ-revolucian reviziisman linion kaj bone lernu kulturajn kaj sciencajn sciojn por kontribui al la revolucio.

Sub direktado de laboristoj, samtempe kun la kritiko kaj lernado, la lernantoj renovigis la malnovtipan elektran motoron laŭ produkta bezono.

Por pli bone konigi al la lernantoj la gravan rolon de elektraj motoroj en produkto, majstro Vu gvidis

ilin viziti antaŭurbajn popolkomunumojn. Komunumanoj diris: “Ni uzas motorojn en plugado, irigacio kaj degrajigo, sed mankas al ni motoraj riparistoj, kaj ni ne povas ripari difektitajn motorojn ĝustatempe. Vere maltrankviliga afero!” La bezono de la komunumanoj plie levis la aktivecon de la lernantoj en lernado. Post reveno ili ofte iris al la laborejo por esploro kaj lernado, tial ili posedis iujn fundamentajn sciojn de industrio kaj riparan teknikon de motoroj. Poste, en liberaj tagoj ili ofte iris al kamparo por ripari motorojn, kaj instalas elektrajn fadenojn kaj lampojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj ricevis ilian varman laŭdon.

## SUKCESO EN HIBRIDIGO DE SORGOJ

Junaj ruĝgvardianoj de la Ŝenjang-a 66-a Mezlernejo ricevis leteron de la revolucia komitato de Bajŝan-komunumo de Gianping-gubernio mil liojn malproksime. En la letero oni skribis: “La sorgo ‘Ruĝa Gvardio N-ro 1’, bona specio elkulturita de vi, akiris abundegan rikolton post unujara provkulturado de nia komunumo. Ni varme gratulas al vi pro la sukceso. Por grandigi la kulturalan areon de tiu specio, ni petas ke vi liveru al ni pliajn mil ĝinojn da tia semo.”

Tiu specio de sorgo estas frukto en kombino de eduko kun produkta laboro fare de la instruistoj kaj lernantoj de la nomita mezlernejo. Somere de 1966, post kiam ili lernis la brilan sepa-majan instrukcion de Prezidanto Maŭ, ili pluaparte studis agrikulturalan scion kaj decidis elkulturi bonan specion de sorgo por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili faris hibridigan eksperimentadon de sorgo sur sia agrikultura bazo per la sorgoj Kingke, Huangke kaj Juegin N-ro 4. Post klopodo de kelkaj jaroj, ili fine sukcesis elkulturi la bonan specion.

Tiu hibridigita sorgo, en komparo kun la lokaj sorgoj, posedas la avantaĝojn de rapida ĝermado,

pli multaj radiketoj, pliforta akomodigemo, eltenemo kontraŭ inundo, sterko-sorbemo kaj rezistivo kontraŭ finsektoj kaj plantaj malsanoj, alta tigo, kaj pli frua maturiĝo kaj facila degrajniĝo.

La junaj ruĝgardianoj estis tre entuziasmaj en la hibridiga eksperimentado. Dum printempa pluĝado, ili ĉiutage kolektis korbon da sterko por la lernejo. Post la elĝermiĝo ili ofte utiligis tempon antaŭ kaj post lecionoj por iri al kampoj por sarkado, irigaciado kaj aliaj surkampaj prizorgoj.

En ĉiu stadio de la kreska periodo de la sorgo "Ruĝa Gvardio N-ro 1", la lernejo gvidis la lernantojn al la agrikultura bazo por ke ili lernu pli multe da agrikulturaj scioj kaj posedu agrikulturan teknikon. La sukceso en elkulturo de la hibridigita sorgo riĉigis la enhavon de la lernoobjekto de la bazaj scioj de agrikulturo kaj akcelis la edukan revolucion de la lernejo. Ĉiu klaso de la lernejo nun jam fondis scian eksperimentan grupon. Ili nun aktive klopodas por plibonigi la sorgon "Ruĝa Gvardio N-ro 1" kaj kulturi novajn bonajn speciojn.



*La Hangĝou-a 4-a Mezlernejo starigis fabrikan de siliciaj rektifiloj por kombini instruadon kun scienca studo kaj fizika laboro. Jen membro de la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso en la lernejo kaj instruistoj kaj lernantino kune kontrolas novan produktadon.*

*Lernantoj de la kampara filio de la Kantona 32-a Mezlernejo kaj lokaj komunumanoj kune starigis fabrikan de agrikulturaj medikamentoj. Jen ili observas novan agrikulturan medikamenton produktitan de ili mem.*





# Kantistino Ascendis Instruan Podion


SONG HIN



**I**UTAGE de marto ĉijare, al Anhuj-universitato ŝi venis instruistino nomata Jin Guanglan. Ŝi estas fama popolkantistino de Fejdong-gubernio, Anhuj-provinco.

Tuj kiam ŝi eniris la lernejon, montriĝis antaŭ ŝi sloganrubando de laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj kun jena surskribo: “Vizitu universitaton, administru ĝin kaj transformu la malnovan universitaton per Maŭzedongpenso”. Tiam Jin Guanglan sentis neesprimeblan ĝojon.


*Jin Guanglan kun studentoj vizitas minejajn laboristojn por verki novajn popolkantojn.*



Nokte, Jin Guanglan serioze preparis lecionon sub lampo. La unua leciono donita de ŝi al la studentoj estis ŝia propra travivaĵo de la dufojaj vizitoj al universitato.

En la senluma malnova socio, kiam Jin Guanglan ankoraŭ estis knabineto, ŝi jam komencis suferplenan vivon de “infan-fianĉino” en la domo de la “fianĉo”. Foje, Guanglan, paŝtante bovon, preterpasis la lernejon, kie laŭte legis bienulaj gesinjoridoj. Ŝi enŝovis sian kapon kaj rigardis kun

*Jin Guanglan sur la instrua podio*



scivolemo. Tiam lakeo de bienulo tuj skurgis ŝin, malice kaj furioze kriaĉante: “Kion vi rigardas, malriĉulino, for!”

Jin Guanglan indigne pensis en si: “Kial la lernejo malpermesas al infano de malriĉulo eĉ enrigardon?”

En 1949, la Ĉina Popola Liberiga Armeo gvidata de Prezidanto Maŭ liberigis ŝian hejmlokon. En septembro de 1959, la Partio sendis ŝin al la Dependata Liceo por Laboristoj kaj Kampanoj de Anhuĵ-universitato por ke ŝi lernu.

Kiam ŝi unuafoje eniris Anhuĵ-universitaton, en ŝia kapo ondiĝis jena penso: Prezidanto Maŭ, dank’ al via gvido ni gajnis liberigon en politiko. Kaj hodiaŭ, vi aranĝis por ni studon en lernejo!

Kun profunda proletara sentimento Jin Guanglan skribis sub la lampo koran kanton “Plumo”:

*En la pasinteco,  
Kiu kampan’ scipovis uzi plumon?  
Kiam plumo estis en la mano  
De la feŭdaj bienuloj,  
Ĝia skribo estis sang’ kaj  
Larmo de la malriĉuloj.  
Kiel multajn malriĉulojn jam al morto  
Pelis ĉiu ĝia vorto!  
Kiel multajn malriĉulojn al infero  
Pelis jam iliaj kontciferoj!*

.....

*En la jar’ mil naŭcent kvardek naŭ,  
Sub la gvid’ de Prezidanto Maŭ,*

*La popolo kaptis ŝtatpotencon,  
Ruĝan stelstandardon hisis en ĉielon.  
Liberigis la laboraj popolanoj  
Kaj la plumo venis en iliajn manojn.*

.....



*La popolo sescent-miliona prenis plumon,  
Skribis sur la vasta ter’ per inko mara  
La brilegojn de l’ linio ĝenerala  
Kaj l’ prosperon de la popolkomunumo;*

.....

Jin Guanglan decidis firme teni tiun plumon por ĉiam laŭdi Prezidanton Maŭ kaj karan Partion. Sed, Liu Ŝaŭki, en koluzio kun plenmano da renegatoj, spionoj kaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en edukaj departementoj, ĉiamaniere klopodis por malhelpi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Printempe de 1961, fabrikante diversspecajn pretekstojn, ili elpelis el la universitato centojn da laboristaj kaj kampanaj lernantoj. Sed, Jin Guanglan kaj kunlernantoj firme kredis, ke la briloj de Maŭzedongpenso certe lumigos Anhuĵ-universitaton, kaj la laboristaj, kampanaj kaj soldataj lernantoj certe revenos!

Jin Guanglan forlasis la universitaton kaj venis al la kamparo. Tie ŝi rigardis kiel siajn instruistojn la vastan amason de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, modeste lernis de ili kaj aktive partoprenis en la ardaĵ tri grandaj revolucionaj bataloj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. Dum la pasintaj dek jaroj, ŝi verkis centojn da versaĵoj de entuziasma prikanto

*Jin Guanglan kantas al komunumanoj popolkanton  
ĵus verkitan de ŝi mem por peti iliajn opiniojn.*







*Jin Guanglan lernas  
kune kun studentoj.*

al la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ, al la granda Komunista Partio de Ĉinio, al la socialisma patrolando kaj al herooj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la hegemonio de burĝaj intelektuloj en universitatoj estis disrompita kaj la proletaro denove prenis universitatojn en siajn manojn!

La Revolucia Komitato de Anhuĵ-universitato decidis inviti Jin Guanglan, ke ŝi servu kiel kumula instruistino en fakultato de la ĉina lingvo. Finfine venis la tago, kiam Jin Guanglan revenis al Anhuĵ-universitato!

Grandpaŝe ŝi ascendis la instruan podion kaj kantis plenentuziasme:

*Laŭ instru' de Prezidanto Maŭ,  
Mi ascendis la podion kun fortega emocio.*

*En la pasinteco, reakciaj  
"Aŭtoritatuloj" viglis ĉe l' podio  
Kaj feŭdismon, kapitalismon kaj reviziismon  
distrumpetis.*

*Kiel multaj gejunuloj estis venenitaj.*

*Sed hodiaŭ instruistoj laboristaj,  
Kamparanaj kaj soldataj sur ĉi tiu podio  
Per lecionoj pri l' tri grandaj revolucioj  
Elkulturis bonajn posteulojn de l' revolucio!*

Ŝia voĉo vibrigis per emocio la korojn de la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj kaj gajnis varman aplaŭdon.

# Sur la Longa

## Transporta Linio inter Kinghaj kaj Tibeto

**L**A Kinghaj-Tibeta Ŝoseo de nia lando, interliganta la urbojn Hining en Kinghaj kaj Lhasa en Tibeto, kun longeco de 2,000 kilometroj, ĉirkaŭiras la grandan Kinghaj-lagon, trakuras vastan dezerton kaj transpasas Kunlun-montaron kun neĝblovoj kaj Tanggula-monton kun alteco de pli ol 5,000 metroj super la mara nivelo. Kuraĝigate de la brila "Instrukcio de la 7-a de Majo" de Prezidanto Maŭ, iu postfront-serva trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo laboranta sur tiu ŝoseo pliapaŝe disvolvas la revolucion spiriton de penema luktado en malfaciloj, plenamplakse konstruas tiun linion kune kun la lokaj popolamasoj kaj tre bone plenumis ĉiujn siajn taskojn el kiuj transporto estas la ĉefa.

### PIONIRA ENTREPRENO

La Kinghaj-Tibeta Ŝoseo serpentumas sur altaj montoj kun nesufiĉa oksigeno kaj frosta klimato. Ĝi trairas multajn lokojn kie estas nek arboj, nek herboj, nek birdoj nek brutoj, kaj neniu iam entreprenis produktadon.

Komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA decidis kulturigi legomojn kaj grenplantojn sub la malfacilegaj kondiĉoj.

Spite al neĝblovado, batalantoj de la armea stacio de Danghjong sur la altebenejo de norda Tibeto kun alteco de 4,300 metroj super la mara nivelo kulturebligis pecon da virga tero kaj unuafoje disjetis legomsemojn sur ĝi. Sed ne longe post kiam plantidoj elteriĝis, ili velkiĝis pro prujno. La batalantoj ne malesperiĝis kaj semis duafoje. Kiam plantidoj elkreskis, denove ili estis detruitaj de hajlo. Vizaĝe

al la naturaj katastrofoj, ili diris heroe: "Se fiaskis dufoje, ni semos triafoje. Ni revoluciaj batalantoj certe venkos la naturon!" Post multfoja batalado kaj senĉesa resumo de sperto, ili fine akiris riĉan rikolton de legomoj sur la 12 muoj da kulturebligita virga tero.

Stimulate de la sukceso en kulturado de legomoj, la armea stacio komencis provon pri bredado de porkoj. En frosta altejo kun nesufiĉa oksigeno, estas malfacile vivi por porkidoj. La komandantoj kaj batalantoj faris ĉion eblan por bone ilin flegi. Se iu porko malsaniĝis, ili injektis aŭ manĝigis al ĝi medikamenton. Vintre, ili bruligis hejtaĵon por ilin varmigi. Kiam porkino naskis porkidojn, bredistoj transportis siajn litaĵojn en la stalon por ĝin flegi tage kaj nokte. Proverbo diras: "En la mondo ne ekzistas malfacila problemo por homo kun firmege volo kaj persistemo." Dank' al sia senlaca klopodado, fine ili sukcesis elbredi la unuan generacion de grasaj porkoj kaj eltrovis metodojn por bredado de porkoj sur la frosta altebenejo de norda Tibeto.

La sukcesoj atingitaj de la armea stacio de Danghjong donis profundan inspiron al la komandantoj kaj batalantoj de la tuta ŝoseo. Post tio, la 14-a roto de iu trupo, modela unuo de kvar bonoj garnizonanta sub la piedo de Kunlun-montaro, komencis konstrui kampojn sur dezerto forigante ovalajn ŝtonojn. Ili fosis kanaletojn por alkonduki akvon el degelinta neĝo sur Kunlun-montaro al la kampoj, forlavi salon kaj alkalon kaj irigacii legomojn.

Por elkulturi delikatajn legomojn sur la altebenejo kun frosta klimato, mallonga senprujna periodo



kaj fortega sablovento, la komandantoj kaj batalantoj komencis malfacilan praktikadon. En sezono por semado, tie ankoraŭ blovis tranĉe malvarmega vento. En la komenco, ili faris kelkajn provojn, sed la plantidoj de legomo ĉiuj mortis de frosto. Ili do plektis maton kaj konstruis ĉirkaŭmurojn kaj tegmentojn al la legomkampoj. Dank' al tio elkreskis legomidoj. Tamen al la plantoj de kukumo kaj tomato kreskis nur folioj kaj branĉoj sed ili ne floris. En kio kuŝis la kaŭzo? Prezidanto Maŭ diris: "En farado de iu ajn afero, se oni ne konas ĝiajn cirkonstancojn, ĝian naturon kaj ĝiajn rilatojn kun aliaj aferoj, oni ja ne konas la leĝojn ĝin regantajn, ne scias kiel agi, kaj ne sukcesos ĝin bone fari." Laŭ tiu instruo ili ripetade esploris kaj analizis kaj fine trovis, ke la kaŭzo kuŝas en tio, ke la temperaturo de la legomkampoj estas tro malalta kaj krome mankas al ĝi organika sterko. Ili do fortondis iom da branĉoj kaj folioj kaj aldonis organikan sterkon. Ĉar mankis al la altebenejo insektoj por transporti polenon, ili mem fekundigis la plantojn kaj fine sukcesis produkti kukumon,

tomaton, florbrasikon, vaks-kukurbon, celerion, laktukon k. a. entute 21 bongustajn legomojn.

Puŝate de tiuj avangardaj unuoj, amasa movado por plenumplekse plifortigi la konstruadon de la Kinghaj-Tibeta Ŝoseo vaste kaj potence disvolviĝis. Malsamaj estas la klimato kaj naturaj riĉfontoj en diversaj partoj de la ŝosea linio, kaj la trupoj disvolvis produktadon konforme al la lokaj kondiĉoj. Ili starigis agrikulturajn bazojn kaj multajn malgrandajn fabrikojn. La hospitaloj de la armeo kaj la kuracaj taĉmentoj de diversaj trupoj kolektis kuracherbojn en profundaj sovaĝaj montoj kaj praktikis kuracmetodon de la ĉina kaj okcidenta medicino en kombino. Vigle disvolviĝas ĉiuj produktaj entreprenoj sur la aŭtovoja linio.

### KONSTRUO DE ŜTALA TRANSPORTA LINIO

La starigo de la agrikulturaj bazoj kaj malgrandaj fabrikoj, pliriĉigis la vivon de la trupoj sur la longa Kinghaj-Tibeta Ŝoseo kaj akcelis la plenumon de la transportaj taskoj.

*La ŝoseo-protektaj laboristoj en Tanggula-monto forigas neĝon por kamiona taĉmento.*



En la pasinteco, tie oni kutime manĝis senakvigitajn legomojn alportitajn de aliaj lokoj, kaj ankaŭ la aliaj flankmanĝaĵoj estis enportitaj. Nun la batalantoj jam povas kontentigi sian bezonon per memkulturitaj freŝaj legomoj kaj ankaŭ plibonigis la provizon de aliaj objektoj.

En la pasinteco, ankaŭ brikoj, tegoloj ktp por baza konstruado sur la ŝoseo devis esti alportitaj de aliaj lokoj. Nun laŭ la kondiĉoj de materialoj en diversaj partoj de la ŝoseo, oni starigis fabrikojn de brikoj, tegoloj kaj kalko kaj lignoprilaborejon, dank' al kio oni reduktis la bezonon de aŭtoj por transporti tiajn materialojn kaj krome ankaŭ garantias ĝustatempan provizon de tiaj materialoj kaj rapidigis la konstruadon de tiu trafika linio.

En konkreta efektivigo de la "Instrukcio de la 7-a de Majo" de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj plifortigis sian amasan laboron. Ili starigis propagandajn staciojn laŭ la ŝosea linio por propagandi al diversnaciaj popolanoj Maŭzedongpenon kaj la bonegan situacion en- kaj eksterlandan. Tio forte puŝis la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpeno en regionoj loĝataj de nacimalplimulto. Kaj la medicinaj laborantoj de la hospitaloj kaj armeaj stacioj iras profunde en regionojn de paŝtistoj por servi al ili, kulturisti "nudpiedajn" kuracistojn por la nacimalplimulto kaj starigi sistemon de koopera kuracado. Tial la vastaj amasoj de terkulturistoj kaj paŝtistoj rigardas la batalantojn kiel siajn proprajn soldatojn kaj rigardas la ŝoseon kiel sian propran trafikan linion. Kiam neĝego obstrukcis la vojon, ili meminitate helpis la batalantojn puŝi aŭtojn kaj liberigi la vojon; kiam mankis brulligno al armea stacio, ili portition al ĝi; kiam komandantoj kaj batalantoj en agrikultura regiono kulturebligis virgan teron, ili meminitate partoprenas ilian laboron kaj diris al ili sian terkulturan sperton. La zorgo kaj helpo de la popolamasoj multe akcelis la plenumon de



*Riĉa rikolto de legomo en alta kaj malvarma regiono de la Kinghaj-Tibeta Ŝoseo.*


la transporta tasko. Komandantoj kaj batalantoj diris: Nur dank' al la subteno kaj helpo de la popolamasoj ni povas konstrui la Kinghaj-Tibetan Ŝoseon en ŝtalan transportan linion.

## KULTURO DE NOVAJ HOMOJ

La malfacila batalo por reformo de la altebenejo hardis kaj kulturis la revoluciajn batalantojn, tiel ke ili scipovas uzi kiel plumon tiel ankaŭ pafilon kaj povas entrepreni kiel industrion tiel ankaŭ agrikulturon.

Veterana batalanto Lju Ĉuankuj, kiu batalis en diversaj lokoj sekvante Prezidanton Maŭ dum la revolucia milito, venis al la nordokcidenta alt-





*Batalantoj kaj komandantoj de ĈPLA havas profundan amikecon kun diversnaciaj popolanoj vivantaj laŭlonge de la ŝoseo.*

ebenejo antaŭ kelkaj jaroj kaj poste venis al la armea stacio de Tanggula-monto por labori kiel ĝia estro. Kun granda entuziasmo kaj alta batalvolo, li gvidis la batalantojn de la armea stacio kulturebligi virgan teron sur neĝmontoj, bredi porkojn kaj kulturi legomojn kaj en junio kaj julio li gvidis ilin fiŝkapti en Tanggula-lago. Tiutempe, glaciaj pecoj ankoraŭ floris sur la lago. Li do saltis la unua en la akvon, dispelis la glaciajn pecojn kaj ĵetis reton por kapti fiŝojn. Ju pli grandan malfacilon li alfrontas, des pli energie li laboras. Batalantoj diris kun admiro: “Nia staciestro vere similas al senvelka pino sur Tanggula-monto!”

En tiuj trupoj sane kreskas junuloj venintaj el diversaj lokoj de nia lando. Ili scipovas batali per pafiloj, terkulturi per sarkiloj, labori kun martelo kaj skribi per plumoj kritikajn artikolojn kontraŭ burĝoj. Post diplomiĝo en alta mezlernejo, kompartiano Ĉeng Juanŝeng, kiu nun laboras kiel ŝoforo de aŭtoregimento, forlasis sian pitoreskan hejmlokon en suda Ĉinio kaj venis al la altebenejo de neĝblovado kiel batalanto de ĈPLA, kun firma decido defendi la patrolandon. Ĉi tie, li ĉiam agas laŭ instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj memkonscie hardas sin en malfaciloj. Iun tagon en junio de

1968, li veturis al Tibeto kun malsano por plenumi taskon. Kiam la taĉmento de ŝarĝaŭtoj revenis de Lhasa, gvidantoj kaj kamaradoj foje kaj refoje admonis, ke li restu ĉe Lhasa por kuracado, sed li rifuzis tion kun decidemo. Kiam la aŭtoj veturis trans monto kun alteco de pli ol 4,000 metroj super la mara nivelo, la kapo doloregis al li pro maldenseco de la aero. La nova ŝoforo sidanta apud li plurfoje deziris direkti la aŭton anstataŭ li, sed li diris: “Malfacila estas tiu ĉi parto de la vojo, do lasu min direkti plue!” Kun obstina persistemo li sekure direktis la aŭton tra la malfacila vojparto de 30 kilometroj. Ĉe la armea stacio de Tuotuohe sin trovas sanitaristo nomata Song Ĉaŭhian, kiu akiris noblan penson kaj multflankajn kapablojn kun unu ĉefa okupo por servi al la popolo, dank’ al hardado en batalo. En ordinara tempo li laboras kiel sanitaristo; kiam la stacio havas multe da gastoj, li laboras kiel servanto de manĝejo; se la kuiristoj estas tro okupataj, li partoprenas ilian laboron kun alligita antaŭtuko; kiam gardistoj estas bezonataj, li gardstaras kun pafilo; kiam la produkta grupo bezonas helpantojn, li povas labori kiel paŝtisto kun vipo en la mano. Ĉiun taskon asignitan de la gvidanto li plenumas tre bone.

# LIN BIAŬ

## Vivu la Venko de Popola Milito

Memore al la 20-a Datreveno  
de la Venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito  
de la Ĉina Popolo

La verko konsistas el jenaj 9 partoj:

1. La ĉefa kontraŭdiro en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la linio de la Partio
2. Ĝuste plenumi la linion kaj politikon de la unuecfronto
3. Sinapogi sur la kamparanoj, fondi kamparajn bazlokojn
4. Konstrui popolan armeon de nova tipo
5. Praktiki la strategion kaj taktikojn de popola milito
6. Persisti pri la politiko de sinapogo sur la propraj fortoj
7. La internacia signifo de la teorio de k-do Maŭ Zedong pri popola milito
8. Venki la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn per popola milito
9. La ĥruŝĉov-reviziistoj estas perfiduloj de popola milito

*64-paĝa broŝuro en formato 18.5 × 13 cm.*

**Eldonis:** Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio  
**Distribuas:** Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo,  
Pekino, Ĉinio

Mendu ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe la Libroservo de  
ĈEL, kies adreso estas P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio





### ŜOŬGUANG-A KOKO

La fame konata ŝoŭguang-a koko de Ŝoŭguang-gubernio de Ŝandong-provinco ricevis tre grandan disvolviĝon kaj en kvanto kaj en kvalito en la lastaj jaroj. La ĝenerala pezo de koko estas 8-9 ĝinoj kaj tiu de kokino — 5.5 ĝinoj. Ĉiu kokino donas pli ol 130 ovojn. La pezo de ovo ordinare estas 65 gramoj ĝis 75 gramoj kaj tiu de plej granda ovo estas 85 gramoj.

Ŝoŭguang-koko estas unu el la bonaj specioj zorge elkulturitaj kaj selektitaj de la laboranta popolo de nia lando post longtempa strebado. Post la Liberiĝo, la popolo de tiu loko serioze resumis sian sperton en selektado kaj bredado de Ŝoŭguang-koko, faris sisteman selektadon, kreis la metodon de kovado per varmdomo kaj aplikis injektadon en printempo kaj aliajn rimedojn por preventi kok-peston, tiel ke la produkto de ŝoŭguang-kokoj ankoraŭ pli altiĝis kaj kvante kaj kvalite. La trajtoj de la kokoj unueciĝis kaj ilia produktivo kaj herediga povo fariĝis pli firmaj kaj multe superis la rekordon de la origina specio.

Nun, ĉiu familio de la gubernio jam havas meznombre 5 tiajn kokojn. Nun, la nombro de kokoj kaj ovojn por generado portataj al diversaj lokoj de la tuta lando pli kaj pli grandiĝis, kaj certa kvanto da tio eĉ estas eksportata eksterlanden.

### VARŜIPO CHANGFENG SURAKVIGITA


La 20,000-tonela varŝipo projektita kaj konstruita de nia lando estas sukcese surakvigita je la 27-a de junio. Tio ĉi estas nova sukceso akirita de post la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio post la finkonstruo de 4 dek-mil-tonelaj ŝipoj fare de Giangnan-ŝipkonstruejo de Ŝanhajo.

Kun la ŝipkorpo, la kompletigitaj ekipaĵoj kaj instrumentoj ĉiuj faritaj en nia lando, la ŝipo povas kontentigi la postulojn de diversaj navigaj regionoj.

### NOVAJ MEDIKAMENTOJ

Lastatempe, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj de la medikamenta industrio de Ŝanhajo sukcesis prove fabriki pli ol 30 novajn medikamentojn por kuraci astmon, hepatiton kaj aliajn malsanojn.

Post la sukcesa provfabriko, ili ankaŭ mem faris kaj muntis ekipaĵojn por produkti la medikamentojn pogrande por klinika aplikado. Multaj fabrikoj de medikamentoj persistis en uzo de kuracherboj de la antaŭurboj kaj la proksimaj provincoj Giangsu kaj Ĝiang, kiuj estas abundaj kaj facile transporteblaj.



*La varŝipo "Changfeng" surakviĝas.*

# Nova Vivo de Surdmutuloj

En la junia numero de 1970 de nia gazeto, ni iom raportis pri la kuracado de surdmutuloj de la Pekina Tria Lernejo por Surdmutuloj per akupunkturo. Nun, ni faru pluan raporton pri la ŝanĝiĝo en tiu lernejo. Post akupunktura kuracado, ĉiuj ĝiaj lernantoj jam tute aŭ parte reakiris siajn aŭd- kaj parol-kapablojn. Iuj el ili jam vizitis ordinarajn elementajn kaj mezgradajn lernejojn por daŭrigi la lernadon, aliaj fariĝis metilernantoj en fabrikoj, triaj fariĝis membroj de popola komunumo aŭ disaŭdigistoj en kamparo kaj kvaraj jam glorie fariĝis batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Nun, ili komencis novan vivon sur diversaj postenoj kaj kontribuas sian forton al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la patrolando.

La kuraca grupo en la lernejo kaj instruistoj resumis la novan sperton en akupunktura kuracado de surdmutuloj.







Tri lernantinoj, kiuj surdmutiĝis antaŭ 7 jaroj, laŭtlegas tekston de ĉinlingva leciono.




Resanigitaj surdmutaj lernantoj lernas kune kun ordinaraj lernantoj.



Ĝang Venguo (viro) estas nun bona disaŭdigisto de Higanĉi-brigado de Fangŝan-gubernio.

Dum partopreno de rikoltado de tritiko, lernantoj laŭte kantas revoluciajn kantojn je laborpaŭzo.






Ji Baǔhua, kiu surdmutiĝis de pli ol dek jaroj, nun jam estas "malgranda instruisto".




Je Naša kaj Je Nagia, filinoj de malriĉkamparano, ambaŭ nun estas bonaj lernantoj de ordinara lernejo.









He Juhaj (meze), Vang Gajkun (virino) kaj Li Cangfu, kiuj fik-  
loĝiĝis en Canggou-komunumo de Tangŝan-gubernio de Pekino,  
laboras sur draŝejo de tritiko.





Song Ginguang (la unua de dekstre), filo de laboristo surdmuta por 14 jaroj, glorie fariĝis aera batalanto de la mara armeo.



La metilernantinoj en la Ledaĵa Fabriko de Pekino ne plu uzas mimikon.





Kamaradoj de la laborista kaj ĈPLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso laboranta en la lernejo faras korverŝan interparolon kun lernantoj baldaŭ irontaj al novaj postenoj.

## Por ke Blinduloj Vidu

**A**NTAŭ du jaroj, mi laboris kiel analizisto en laboratorio de hospitalo kaj ne scipovis kuraci okulajn malsanojn. En marto de 1969, kiam en nia Ĉinmedicina Hospitalo de Taŭjuangubernio de Hunan-provinco stariĝis okula sekcio, nia gvidanto decidis, ke mi ŝanĝu mian okupon, kaj tiel mi fariĝis okulistino. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**eltrovi veron tra praktiko, denove tra praktiko pruvi kaj disvolvi veron**”, mi konsciencie praktikas, diligente servas al la popolo kaj per kuracado havigis al 225 blinduloj vidkapablon.

### DE KIE VENAS LA KURAĜO?

Kiam mi fariĝis kuracisto, mi sentis kaj ĝojon kaj maltrankvilon. Mi ĝojis, ĉar mi, kiu multe suferis en la malnova socio, nun fariĝis popola kuracisto kaj plenumas la gravan taskon de protektado de la sano de revoluciaj amasoj, dank’ al la gvido de Prezidanto Maŭ. Mi maltrankviliĝis, ĉar mi havis nek necesajn sciojn nek sperton kaj timis, ke mi ne povos bone plenumi la taskon, kiun la Partio konfidis al mi.

Ne longe poste, iu junulo el malriĉkamparana familio, nomata Liu Guoking, venis al nia hospitalo. Li demandis min: “Doktoro, ĉu mia okulo estas kuracebla laŭ via opinio?” Mi rigardis lian dekstran okulon kaj trovis, ke sur la okulglobo kreskas tumoron en grandeco de fabo kaj kun kelkaj haroj sur ĝi. Pri tia malsano mi nenion legis en libroj kaj neniam vidis tian kazon en praktiko. Mi do diris al li: “Nia hospitalo ne havas tiel bonajn kondiĉojn kaj al mi mankas sperto por kuraci vian malsanon. Estus preferinde, ke vi vin turnu al granda hospitalo!” Aŭdinte miajn vortojn, li kuntiris siajn brovojn kaj diris: “Mi jam vizitis grandan hospitalon kaj iu maljuna kuracisto diris, ke mi suferas de okulfunda tumoron kaj proponis enuklei mian dekstran okulon, ĉar alie mia vivo estos en danĝero.” La vorto “enuklei”

tuj memorigis al mi, ke en la malbeninda malnova socio estis malfacilege por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ricevi medicinan helpon kaj ili devis baraktadi en malsanoj. Kaj mi memoris, ke antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, mia patrino suferis de okula malsano kaj devis enukleigi sian okulon pro la kontraŭrevolucia reviziisma medicina kaj higiena linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki. Hodiaŭ, dank’ al la gvido de Prezidanto Maŭ, ni laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tenas en niaj manoj la regpotencon de medicino kaj higieno, kaj mi nepre ne lasos la klasan fraton suferi tion, kion mia patrino suferis! Tiam mi diris decideme al malgranda Liu: “Mi nepre faros ĉion eblan por kuraci vin!” Mi detale informiĝis pri la estiĝo kaj disvolviĝo de lia malsano. La tumoron estis denaska kaj pli kaj pli grandiĝis dum lia kreskado. Post ekzameno, mi trovis, ke nur kelkaj maldikaj angioj ligiĝas kun la tumoron. Mi pikis ĝin per pinglo por ekzameni la rilaton inter la tumoron kaj la okulmembrano. Mi ekvidis, ke ĝi ja ne estas okulfunda tumoron, sed tumoron kreskanta sur la okulglobo. Tiu eltrovo tre ĝojigis min. Mi faris operacion kaj fortranĉis la tumoron al malgranda Liu. Tiamaniere mi ebligis al la dekstra okulo de malgranda Liu, kiu blindis dum pli ol 20 jaroj de lia naskiĝo, ekvidi la ruĝan sunon. Kun feliĉaj larmoj en la okuloj, malgranda Liu longe fiksas sian rigardadon al la portreto de Prezidanto Maŭ kaj ne volis foriri.

Dum la praktikado de kuraco al blinduloj, la instruo de Prezidanto Maŭ pri ekskluziva kaj senrezerva servado al la popolo kaj la senkompara entuziasmo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al la revolucio profunde edukis kaj forte stimulis min, ke mi ricevis kuraĝon por venki la malfacilojn.

Iutage, malriĉkamparano-komunumano Daj Ŝi-kiu vizitis nin por kuraci okulojn. Mi aranĝis



por li kuracadon en la hospitalo. Kiel kuraci liajn denaske blindajn okulojn? En tio mi ne havis klaran ideon. Mi faris al li operacion laŭ metodo indikita en medicina literaturo. Sed tio ne nur ne sanigis liajn okulojn sed eĉ alportis al li neelteneblan doloron. Mi estis kaj ĉagrenita kaj maltrankvila. Ne plu havante kuraĝon por daŭrigi la kuracadon, mi aplikis rimedon por sendolorigi lin kaj lasis lin hejmeniri. En la tago de lia elhospitaliĝo mi intencis iom konsoli lin, sed kontraŭe li konsolis min dirante: “Ne maltrankviliĝu, doktoro Juan. Mi venis kun du kalkuloj, nome: se mi resaniĝos, mi pli bone kontribuos al la popolo; se la kuraco ne sukcesos, mi tamen klopodos venki ĉiajn malfacilojn por multe kontribui al la revolucio!” Kvankam malmultaj estis liaj vortoj, sed ĉiu el ili trafis mian koron. Mi komparis mian faron kun tiu de doktoro N. Bethune, kiu havis ekstreman respondecon al sia laboro. Kaj ju pli mi komparis, des pli fortan malĝojon kaj honton mi sentis. Kamarado N. Bethune estis fremdulo, li tamen ne trovis la dekmil-lian vojaĝon longa por veni al Ĉinio kaj helpi nin en la Kontraŭjapana Rezistmilto, eĉ sen domaĝo de ofero de sia vivo. Mi estas kompartiano kaj havas la devon servi al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj per kuracado. Ĉu decas, ke mi lasis pacien-ton foriri sen sukcesa kuraco?

Post altigo de mia kono, tuj altiĝis mia kuraĝo por praktiki. Mi revenigis Daj Ŝikiu al la hospitalo. Ĉifoje mi faris detalan enketon pri la kaŭzo de lia malsano. La patrino de Daj Ŝikiu diris, ke ŝi suferis de grava malsano kaj febris terure ĝis deliro, kiam ŝi estis graveda je Daj Ŝikiu. Analizo pri tio konvinkis min, ke la okuloj de Daj Ŝikiu blindiĝis ĉefe pro la febreco de lia patrino. Kaj

krome, en la malnova socio, lia patrino suferis de malsato kaj malvarmo, kio malhelpis la kreskon de la feto. Mi preskribis al li kuracherbojn por elimini *feng*\* kaj *je*\* kaj poste fortikigis liajn lienon kaj hepaton per medikamentoj. Post kuracado de pli ol unu monato, fine liaj okuloj ekvidis lumon. Nun Daj Ŝikiu laboras kun ankoraŭ pli alta revolucia entuziasmo.

## FONTO DE SAĜO

Mi komprenis el la sperto en laboro, ke por bone servi al la popolo, oni devas esti ne nur kuraĝa sed ankaŭ lerta en praktiko kaj eltrovi leĝojn en ĝi.

Foje en akcidenta eksplodo la okulo de malriĉkamparano-komunumano Ĝu Ajŝan estis vundita. Dum ekzameno mi trovis, ke jam okazis al li katarakto. Mi faris kuracadon al lia vundo. Post kelkaj tagoj lia vundo estis kuracita, sed la katarakto restis. Laŭ aserto de burĝaj medicinaj “aŭtoritatuloj”, kiam katarakto ankoraŭ ne maturiĝis, oni ne povas ĝin kuraci, kaj post ĝia maturiĝo la okulo blindiĝas kaj tiam la malsano fariĝas ankoraŭ pli nekuracebla. Oni povas fari operacion nur je maturiĝo de katarakto. Sed mi ne metis esperon sur operacion. Mi studis la instruon de Prezidanto Maŭ: “**La fundamenta kaŭzo de la disvolviĝo de objekto kuŝas ne ekstere, sed interne de ĝi, en ĝiaj internaj kontraŭdiroj.**” Mi pensis, ke katarakto ne trudiĝis en la okulon de ekstere, sed ĝi okazis pro tio, ke la faktoro kaŭzanta katarakton okupis regantan pozicion interne de la okulo. Ĉu do estas eble restarigi la regantan pozicion de la faktoro por subpremi katarakton kaj denove ŝanĝi la staton? Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, tio estas tute ebla.

*Kamaradino Juan Cajjun rakontas al siaj kolegoj sian komprenaĵon en viva studo kaj viva apliko de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso dum praktiko.*



*Kamaradino Juan Cajjun (la unua de dekstre) interparolas kun aliaj reprezentantinoj dum la Tria Kongreso de Aktivuloj de Hunan en Viva Studo kaj Viva Apliko de Maŭzedongpenso.*



Mi do preskribis drogherbojn al la paciento por neniigi al li *fe\** kaj *ju\** kaj stimuli lian organison, tiel ke la faktoroj en la korpo de la paciento kontraŭ katarakto estu movataj por sorbi ĝin. Post kuracado de duona monato, fine malaperis katarakto kaj post alia duona monato da kuraco lia vidpovo levigis ĝis 1.2 gradoj. Post tio, mi kuracis kelkajn pacientojn de katarakto pro vundo per la sama metodo kaj ricevis bonan efikon.

Dum kuracado, mi ankaŭ utiligas eksterajn faktorojn. Agante laŭ la teorio, ke eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj, mi sukcesis kuraci pacienton de katarakto post ĝia maturiĝo. Onklino Song blindiĝis antaŭ 43 jaroj. Mi detale ekzamenis ŝiajn okulojn kaj trovis, ke ili estas verdaj kaj tute sensentaj al lumo. Tio prezentas katarakton post maturiĝo.

En la komenco mi preskribis al ŝi kuracherbojn laŭ ĉina medicino, sed la kuraciloj ne montris efikon. Mi pensis, ke la malsano estas nekuracebla nur per medikamento pro tio, ke la katarakto de onklino Song jam ekzistis 43 jarojn kaj fariĝis tiel obstina, ke necesas potenca ekstera faktoro por ĝin venki. Tiam venis al mi la ideo kuraci onklinon Song per ĉina antikva metodo, nome "forigi katarakton per ora pinglo". Mi tamen nur foje aŭdis mencion sed ne detalan klarigon pri ĝi. Por resanigi la okulojn de la onklino, mi decidis fari eksperimenton per mia okulo. Fari eksperimenton en okulo ja estas danĝere, tamen se oni agas rigore laŭ scienca maniero, danĝero povas esti evitebla. Mi do komencis piki mian okulglobon vizaĝe al spegulo. En la komencaj provaj enpikoj, mi ŝvitis de doloro, sed spite al tio mi daŭrigis la provadon kaj fine

eltrovis la ĝustan pozicion kaj povis enpiki la pupilon ĉiufoje. Post la sukceso, mi tuj faris operacion al onklino Song per pinglo. Dank' al la stimulo per la ekstera faktoro, tuj okazis ŝanĝo interne kaj verda akvo kovris la tutan pupilon. Mi eltiris la verdan likvon per injektilo kaj pansis la okulojn. Poste mi preskribis al ŝi kuracherbojn por stimuli la organison kaj rapidigi restaron de la kapabloj de la okuloj dank' al akcelo de la cirkulado de sango. Iutage, kiam mi forprenis la pansaĵon, onklino Song ĝoje ekkriis kun miro: "Jam povas vidi! Jam povas vidi!" En la sekvinta tago, onklino Song formetis la bastonon kiun ŝi portadis kun si por 43 jaroj kaj partoprenis la mitingon kaj manifestacion en la gubernia urbo por celebri la 21-an datrevenon de la fondiĝo de nia lando.

## PRAKTIKI DUM LA TUTA VIVO

Iu malfacile kuracebla okulfunda malsano, kiun oni ne povas rimarki laŭ la aspekto de la okulo, estas nomata glaŭkomo. Burgaj medicinaj "aŭtoritatuloj" ĝin priskribas kiel "nekuraceblan malsanon". Ĉu ekzistas "nekuracebla malsano"? Prezidanto Maŭ instruas nin: "La ŝanĝiĝado de la objektiva reala mondo neniam finiĝos, tial la homa konado pri vero tra la praktiko ankaŭ neniam kompletigis." Mi pensis, ke ĉio en la mondo estas konebla kaj transformebla kaj ne povas esti malsano absolute nekuracebla. La malsanoj nun kuraceblaj ja estis "nekuraceblaj" en la pasinteco. Do la hodiaŭaj "nekuraceblaj" malsanoj povas fariĝi kuraceblaj, se nur ni bone konos iliajn leĝojn tra praktiko, konado, denova praktiko kaj denova konado.





*Malriĉkamarana komunumano Daj Ŝikiu (meze) blinda dum 32 jaroj reakiris vidkapablon kaj ludas aktivan rolon en la klasa batalo, produkta batalo kaj sciencaj eksperimentoj.*

En aŭtuno de la pasinta jaro, iu kamarado suferanta de okulfunda malsano venis al nia hospitalo. Li diris, ke li suferis de reŭmatisma artrito en la infanaĝo kaj kiam li liberiĝis de ĝi, lin tamen trafis okula malsano kaj la vidkapablo reduktiĝis ĝis 0.1 grado. Kaj krome li eksuferis ankaŭ de aliaj malsanoj kiaj stomaka malsano, doloro en la lumbo, neŭrozo, senapetiteco kaj malbona dormo. Por havigi al li memfidon pri kuracebleco de la malsano, mi diris al li, ke ni nepre klopodos lin resanigi.

Mi faris ĉiuf flankan enketon pri la okula malsano de tiu kamarado kaj akiris bonan konon pri ĝia historio kaj la nuna stato. Kaj mi analizis la kaŭzon de ĝi, konsultante medicinan literaturon de nia patrolando. En libro oni montris du specojn de kaŭzoj de tiu malsano: 1. entrudiĝo de eksteraj *feng\**, *han\**, *ŝi\**, *ŝu\**, *zaŭ\** kaj *huo\**; 2. nenormalaj humoroj de la paciento mem. Mi opinias, ke tiu opinio estas prava. La malsano de la paciento aperis ĝuste sub la influo de reŭmatismo. La malsano de la okuloj tre malĝojigis lin, tiu humoro certe influis la funkcion de la organoj, kaj perturbiĝo de la organoj siavice malbone influis la malsanon de la okuloj. Por kuraci la okulmalsanon, oni devas fari, krom kuraco per

akupunkturo kaj medikamentoj, unue politikan kaj ideologian laboron por kuraĝigi la pacieron. Kun tiu opinio, mi ofte studis brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun la paciento kaj faris korversajn interparolojn kun li. Sereniĝis lia animo kaj sekve fortiĝis lia volo. Tiam mi unue forigis el li *feng\** kaj *ŝi\** kaj poste fortikigis liajn hepaton kaj renojn, por ke lia organismo bone funkcii kaj akcelu la resaniĝon de la okuloj. Post tia kuracado dum pli ol monato, lia vidkapablo altiĝis de 0.1 ĝis 1.2 grado. Poste, mi uzis la saman metodon en kuracado de pacientoj de okulfundaj malsanoj kiaj retinito kaj atrofio de vidaj nervoj kaj ricevis bonan efikon ĉe plejparto de la kazoj. La faktoj pruvis, ke dank' al praktiko sub la direktado de la brilaj filozofiaj pensoj de Prezidanto Maŭ, "nekuraceblaj" malsanoj povas iom post iom fariĝi kuraceblaj.

Mi firme decidis servi dum la tuta vivo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ĉiam observante la instruon de Prezidanto Maŭ "**praktiko, konado, denove praktiko, denove konado**"!

*\*je* (varmo), *ju* (stagno), *feng* (vento), *han* (malvarmo), *ŝi* (humido), *ŝu* (varmego), *zaŭ* (sekeco) kaj *huo* (fajro) estas terminoj de ĉina medicino por montri kaŭzojn de malsano.

# Nova Fizionomio de Kamparo Akvoriĉa

**K**OMENCE de somero ni vizitis Hingiaŭ-popol-  
komunumon en la suda antaŭurbo de Kan-  
tono. Apenaŭ ni iris en la areon de la nomita  
komunumo, antaŭ niaj okuloj prezentigis bela bildo  
de riĉa vilaĝo sude de Jangzi-rivero: Prospere  
kreskantaj plantoj ondiĝas en vento; bone ordi-  
gitaj legomkampoj verdas blue; kaj kukumoj,  
lentoj... pendas sur la bambuaj apogiloj; frukt-  
arbaroj etendiĝas vaste, fruktoj aromas, arboj  
de liĉio, longano kaj vanpio (*Clausena lansium*)  
konkure floras, kaj cidonioj, bananoj, eribotrioj  
kaj prunoj abundas sur la arboj; irigaciaj kanaletoj  
torentas tra la kamparo kaj gaje laboras komunu-  
manoj.

Antaŭ tiu prospera sceno la respondeculo de  
la revolucia komitato de Hingiaŭ-komunumo entu-  
ziasme rakontis al ni la grandan ŝanĝiĝon de la  
komunumo.

La komunumo situas sur la delto de Perlo-  
rivero, kie interkruĉiĝas riveretoj, fekundas la tero,  
varmetas la klimato kaj sufiĉas pluvokvanto.  
Ĝi estas taŭga loko por kulturi legomojn, rizon,  
sukerkanon kaj bredi fiŝojn en lagoj. Sed, sub  
la malluma regado de imperiismo kaj kuomintangaj  
reakciuloj kaj kruela subpremado kaj ekspluato  
de la bienula klaso antaŭ la Liberiĝo, tie la akvo-  
utiligaj konstruoj ne ricevis riparon dum multaj  
jaroj, senĉese okazis katastrofoj de inundo, sekeco,  
ventego kaj fiinsektoj kaj tre mizere vivis la popol-  
anoj. En 1947, inundo difektis ĉiujn digojn am-  
baŭborde de Luntoŭ, Hiaŭĝoŭ, Tuhua k. a. lokoj,  
kaj miloj kaj miloj da hektaroj da bonaj kampoj  
fariĝis maro. Rikoltinte neniun greneron, multaj  
kamparanoj vendis siajn infanojn, perdis sian  
familion aŭ mortis de malsato. Tiam la ses filoj  
kaj unu filino de malriĉkamparano Huang Jang  
en Ŝahi-vilaĝo ĉiuj mortis de malsato. Ho, eĉ  
la torenta Perlo-rivero ne povis forlavi la sangon

kaj larmojn de la suferantaj popolanoj de Hingiaŭ!

En 1949, la popolanoj de Hingiaŭ liberiĝis kaj  
fariĝis mastroj de sia lando. Sub la gvido de la  
granda gvidanto de nia popolo Prezidanto Maŭ,  
la vastaj amasoj de kamparanoj sin organizis kaj  
suriris la vojon de kolektivigo. En 1958, sub  
la brilo de la ĝenerala linio la Hingiaŭ-anoj plene  
utiligis la superecon de la popola komunumo kaj  
levis amasan movadon por konstrui akvoutiligan  
sistemon sinapogante sur propraj fortoj. Post  
penema lukto de kelkaj jaroj ili konstruis grandajn  
digojn de Hingiaŭ, Gonghe, Baĝoŭ k. a. kun la  
totala longeco de 33 kilometroj laŭ la bordo de  
Perlo-rivero ĉirkaŭanta la tutan komunumon,  
plialtigis kaj plifortikigis kontraŭtajdan digon,  
dragis kanalojn kaj plenamplakse ordigis la drenan  
kaj irigacian sistemon. Samtempe, ili konstruis  
ankaŭ 64 kluzojn por dreni inundakvon kaj 41  
elektrajn pumpstaciojn por drenado kaj irigaciado.  
Dank' al tio, pli ol 47,000 muoj da kampoj interne  
de la digoj ne plu estis minacataj de superakvego  
kaj sekeco kaj radikale ŝanĝiĝis la tragika stato  
de Hingiaŭ en la pasinteco: "Ĉie brilas akvo  
se torent' inundas, pro rikolt' nenia ĉie malsatmort'  
abundas." En 1968, la Norda Rivero, branĉo de  
Perlo-rivero, inundis kun eksterordinare granda  
skalo en la historio. La muĝanta superakvo ren-  
kontiĝis kun la martajdo en la malsupra baseno  
kaj tiel la akvonivelo abrupte leviĝis kaj forte sturmis  
la digojn. Dank' al laŭbordaj kontraŭtajdaj digoj,  
kluzoj por drenado kaj irigaciado, oni efike rezis-  
tis kontraŭ la atako de la diluvo kaj akiris bonan  
rikolton de greno, legomoj, sukerkano kaj fruktoj.  
Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj  
diris kun profunda sento: "Se tiel granda diluvo  
okuzus en la malnova socio, ĉi tie certe fariĝus  
akva vastejo kaj la loĝantoj devus morti aŭ perdi




la familion. Sed nun certas riĉa rikolto kaj feliĉe vivas la homoj kaj prosperas brutoj.”

Samtempe kun entreprenado de akvoutiliga konstruado la vasta membraro de Hingiaŭ-komunumo sin okupis pri agrikultura fundamenta konstruado, ekzemple kulturebligo de virga tero, ebenaigo de kampoj kaj plibonigo de grundo, tiel ke pli ol 15,000 muoj da malebenaj kampoj fariĝis irigaciataj. Krome ili ankaŭ pliiĝis 2,000 muojn da kampo, turnis 20,000 muojn da kampoj kun unu rikolto en unu jaro en tiujn kun du rikoltoj, kaj plantis liĉion, longanon kaj aliajn ekonomiajn arbojn sur multaj dezertaj montetoj kaj kontraŭinundaj digoj. En la brigadoj de Hiaŭĝoŭ, Lianhing, Fenghe k. a., oni ankoraŭ organizis longmarŝan taĉmenton el cent homoj por kulturebligi virgan teron en montregiono fora je 70 kilometroj. Disvolvante la revolucionan spiriton de penema luktado en malfaciloj, la taĉmentanoj faris pli ol mil muojn da ŝtuparaj kampoj, sur kiuj ili plantis grandan nombron da fruktarboj kaj bambuoj, kaj ankaŭ rizon, arakidon, sukerkanon, maniokon, ananason, akvomelonon kaj kuracherbojn. Nun la tuta montaro jam portas verdan veston. En la pasinta jaro, oni jam rikoltis bambuojn kaj akiris riĉan rikolton de rizo, manioko, arakido, akvomelono, ananaso k. a.

Krom entrepreno de akvoutiligo kaj agrikultura fundamenta konstruado, la komunumanoj ankaŭ disvastigis bonajn speciojn kaj konvenan densplantadon, kulturis plantojn por preparo de sterko, multe faris sciencajn eksperimentojn kaj

terkulturis per scienca maniero. Dank’ al tio multe altiĝis la pomua produktokvanto. En la lastaj jaroj ili per diversaj manieroj plivastigis la areon kun pluraj rikoltoj sur legomkampoj, tiel ke ili akiris 8-9 rikoltojn de legomoj en unu jaro. En rizkultura regiono ili energie vastigis la kultivan sistemon de tri rikoltoj en unu jaro kaj sur kampoj de sukerkano mikse plantis rizon. En fruktarba regiono ili vaste alprenis ŝprucigon de novaj agrikulturaj insekticidoj por preventi kaj ekstermi fiinsektojn, aktive alkondukis novajn speciojn kaj praktikis miksan plantadon. Ekzemple, antaŭe ĉi tie oni ne kulturis ananason. Post kiam sukcesis ĝia provplantado en 1961, nun ĝiaj kulturejoj jam donis multajn fruktojn. Tiamaniere la produktokvanto de diversaj ekonomiaj plantoj havis rimarkindan altiĝon. La meznombra pomua produktokvanto de greno superis mil ĝinojn en sinsekvaj dek jaroj, kaj en la pasinta jaro ĝi atingis 1,200 ĝinojn; tiu de legomo estas 12,000 ĝinoj, 30-40 specioj de legomoj estas liveritaj al merkato; la jara totala produktokvanto de tie produktataj famkonataj fruktoj superis 30,000,000 ĝinojn. Krome, la produktokvanto de sukerkano, fiŝoj kaj dombestoj kaj nombro de porkoj grandmezure pliiĝis. En la lastaj kelkaj jaroj la popola komunumo Hingiaŭ ĉiujare liveris al la ŝtato grandnombron da greno, fruktoj, legomoj, sukerkano, laĝetfiŝoj, porkoj kaj dombestoj, kontribuante al la socialisma konstruado de nia patrolando.

Dank’ al penema klopodo de la komunumanoj ilia kolektiva ekonomio pli kaj pli potenciĝis.




Nun la tuta komunumo posedas 41 traktorojn, 68 rizplantajn maŝinojn, 512 draŝilojn, 236 pum-pilojn, 17 aŭtojn, 13 motorajn fiŝkaptajn ŝipojn, 278 akvoŝprucigilojn, 200 muelilojn de furaĝo kaj pli ol 100 diversajn ilmaŝinojn. Ili ankaŭ starigis grenan prilaborejon, oleopremejon, brikfarejon, ŝipkonstruejon, baotriparejon, riparejon de agrikulturaj instrumentoj, prilaborejon de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj aliajn fabrikojn servantajn al la agrikultura produkto.

Kun la disvolviĝo de la kolektiva ekonomio, la vivnivelo de la komunumanoj pli kaj pli altiĝis. La tuta komunumo starigis fadenan disaŭdigan sistemon, ĉiuj vilaĝoj havas elektrajn lampojn,

ĉiuj produktogrupoj grentenejojn kaj ĉiuj familioj ŝparmonon kaj superfluan grenon. Komunumanoj konstruis novajn domojn kun pli ol 5,000 ĉambroj kaj nemalmultaj el ili aĉetis biciklon, kudromaŝinon, brakhorloĝon kaj radioricevilon. Ankaŭ kultura, eduka kaj higiena aferoj rapide disvolviĝas ĉe ili. En la tuta komunumo starigis 20 mezgradaj kaj elementaj lernejoj kiuj ebligis lernadon al ĉiuj geknaboj de la komunumanoj. Samtempe la komunumo havas centran kuracejon, ĉiu brigado kooperan medicinan kaj higienan stacion kaj ĉiu produktogrupo sian sanatoriiston. La komunumanoj ĉiuj partoprenis kooperan kuracadon, kio garantias ilian bonfarton. La antaŭe suferanta Hingiaŭ nun turnas sin en prosperan socialisman novan vilaĝon.

*Esploro pri kreskado de rizo*

*Ŝilugang-kluzo de Hingiaŭ-komunumo*







# Arbaroj sur Sablaj Montetoj

LIN ĜOŬ

**V**ETURANTE malsupren per vaporŝipo laŭ la rivero Songhua, ni venis en Fuju-gubernion de Gilin-provinco, la mezan parton de la okcidenta protekta forsta zono en Nordoriento de nia lando.

Tiu forsta zono etendiĝas de Hinmin-gubernio de Liaŭning-provinco ĝis Gannan-gubernio de Hejlonggiang-provinco, de la sudo al la nordo trapasante la tri provincojn de nia Nordoriento. Ĝi serpente longas pli ol 800 km. Dank' al ĝia protekto, la agrikultura produkto de tiu ĉi regiono havas rapidan disvolviĝon. La vizito al Fuju-gubernio profunde impresis nin.

Kiam ni eniris la gubernion, antaŭ niaj okuloj prezentiĝis belaj pejzaĝoj. Sur la vastaj bordoj laŭ la rivero Songhua estas maro de prosperaj verdaj arboj. Sablofiksigaj kaj bordoprotektaj arbaroj kun alta kaj dika trunko ligiĝas kune kaj staras majeste kvazaŭ verda Granda Muro; bonordaj

kampoprotektaj forstoj kun rekta trunko ŝirmas la kampojn kontraŭ vento kaj moviĝanta sablo; krome aromaj fruktaj arbaroj kaj pejzaĝaj arbaroj multe beligis la urbojn kaj vilaĝojn.

La gubernio situas en la nordokcidenta Gilin kaj estas triflanke ĉirkaŭata de la rivero Songhua. Iu kamarado de la gubernia revolucia komitato diris al ni: Antaŭ la Liberiĝo, laŭborde sin trovis granda sabla zono larĝa je unu km. kaj longa je 150 km., kiun oni nomis granda sabla drako. Printempe kaj aŭtune, ventego kun ruliĝanta flava sablo vualis la ĉielon kaj en palpebrumo kuris dekelkajn liojn foren. Tiam ĝi kovris per sablo bonajn kampojn, enterigis domojn kaj baris trafikon. En la suferplenaj jaroj, pro la subpremo kaj ekspluato de la reakcia reganta klaso kaj la japana imperiismo, plus la plago alportita de la vento kaj sablo, la vivo de la popolo estis tre malfacila. Tiam cirkulis tragika popolkanto: "En la kampoj kovritaj de sablo, ni semas abunde sed rikoltas malmulte; post pago de

la terrento al la bienulo, ni ne povas nin satigi eĉ per kaĉo.”

Post la Liberiĝo, dank’ al la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la popolo de Fuju fariĝis mastro de la ŝtato. Kune kun la popolo de la tri provincoj en Nordoriento, ili aktive respondis la alvokon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri **“verdigo de la Patrolando”** kaj forstumis en tre malfacilaj kondiĉoj grandiozan okcidentan protektan forstan zonon.

Trapasinte kampoprotektajn forstajn zonojn kaj fruktajn arbarojn, ni venis al la vilaĝo Hiaŭhilanghe

de la agrikultura kaj forsta brigado de Bodu-popolkomunumo — hejmloko de la tutlanda forsta labormodelo Tian Fu, kiu faris grandan kontribuon al konstruado de la forsta zono. Tiu malgranda vilaĝo en profunda arbaro prezentiĝis tre vicleplena sub la sunbrilo. La komunumanoj streĉe laboris en kampoj de ondiĝanta tritiko. La neĝblankaj ŝafaroj avide mordis freŝajn herbojn sur la paŝtejo, kiu similas al verda tapiŝo. La bruantaj traktoroj kaj dizelmaŝinoj forpelis silenton de la malgranda vilaĝo.

En la forstejo de la brigado ni vidis Tian Fu. Li ne tuj diris al ni, kiel la miljara sabla zono fariĝis

*Sub la protekto de arbaroj*





verda maro, sed rakontis pri ĝia pasinteco: La aĝuloj de Hiaŭhilanghe ĉiuj klare memoras, ke en 40 jaroj antaŭ la Liberiĝo la vilaĝo trifoje devigite translokiĝis pelate de la sablovento. Post ĉiu tia ventego, fekundaj kampoj fariĝis flavaj sablomontetoj. Perdinte vivrimedojn, la loĝantoj devis migri al aliaj lokoj. En la malnova socio, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj estis tiel malriĉaj, ke ili eĉ ne havis lokon por sin ŝirmi, do kie ili plantus arbidojn? Post la Liberiĝo ili jam estas mastroj de la ŝtato kaj decidis planti arbarojn por la revolucio kaj ŝanĝi la fizionomion de la naturo.

Tian Fu estas modesta malriĉkampano, li ne volis paroli pri si mem. Ni informiĝis de komunumanoj, ke en la streĉa forstumado li tagnocte laboregis kune kun siaj samlokanoj. Por kreskigi arbidojn sur sablomontetoj, li ofte kaŭris tie dum ventego por atente observi ventan direkton kaj moviĝan rapidecon de sablo. En observado li ankaŭ faris eksperimentadon. Malgraŭ ke lia vizaĝo bruniĝis de ventado kaj la okuloj ruĝiĝis de maldormo, li tamen ne volis ripozi. Post senĉesa eksperi-

mentado, li fine sukcesis trovi rimedon de arbidplantado per starigo de kontraŭventaj ŝirmiloj por jungi la moviĝan sablon. Ekde tiam kreskas verdaj arbidoj sur la flavaj sablomontetoj.

La sukceso de la Hiaŭhilanghe-anoj en forstumado multe inspiris la popolon de la tuta gubernio, tiel ke leviĝis amasa movado de forsto. Por kontentigi la bezonon de la amasoj al arbidoj en forstokulturo, membroj de la arbid-kultura grupo el 17 junulinoj modeste lernis de veteranaj kampanoj arbid-kulturan teknikon kaj kulturebligis virgan teron por grandigi sian bedon. Krome, ili portis de aliaj lokoj multajn bonajn arbidojn por la amasoj. Ĉar la grupo faris sian kontribuon en la forstumo, ĝi fariĝis unu el la avangardaj kolektivoj de la gubernio. Dum la forstumo la popolo de Fuju ĉiam sin apogis sur la kolektiva ekonomia forto de popola komunumo, luktis en malfaciloj kaj senĉese akiris novajn atingojn. En la lastaj pli ol dek jaroj ili kulturis 125,000 muojn da kampoprotekta arbaro, 96,000 muojn da sablofiksiga kaj bordprotekta arbaro, 262,000 muojn da fruktaj arboj kaj arboj por

*Tian Fu (meze) kaj komunumanoj en frukta ĝardeno*



hejto kaj konstruo, kaj krome protektajn arbojn ambaŭflanke de ĉefaj ŝoseoj de la gubernio longaj je pli ol 430 km.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la popolo de Fuju marŝas antaŭen en venko, plue plantis arbedojn de dekmiloj da muoj, tiel ke senĉese plivastiĝis la okcidenta forsta zono de Nordoriento.

La longa densa forsta zono en Fuju-gubernio katenis la grandan sablan drakon kaj portis feliĉon al la popolo. Antaŭe la produktokvanto de greno en tiu ĉi loko estis malalta pro vento kaj sablo. Nun, dank' al protekto de la forsta zono kaj alpreno de aliaj efikaj aranĝoj, la forlasitaj kampoj ricevis rekulturadon, malfekundaj kampoj turniĝis en bonajn kampojn kaj la tuta gubernio akiris stabilan kaj altan produktokvanton de greno en sinsekvaj jaroj. En la pasinteco bezonataj lignoj de la gubernio plejparte estis liveritaj de aliaj lokoj. Nun, la granda arbaro liveris al ili grandan kvanton da lignoj por konstrui pontojn kaj domojn kaj fari agrikulturilojn. Krome ili starigis pli ol 200 fruktajn ĝardenojn. Je la rikolta tempo de fruktoj, ĉie aromas sovaĝa pomo,


vinbero, pomo kaj aliaj fruktoj. Komunumanoj diris ke la arbaro estas granda trezoro.

58-jara komunumano Ŝaŭ Boling, kiu multe suferis en la malnova socio, havas aparte profundan konon pri la granda ŝanĝiĝo. Iun nokton antaŭ 30 jaroj, lia terdometo subite estis enterigita de moviĝanta sablo. Najbaroj savis lin kaj liajn familiaĵojn el posta fenestro de la dometo kaj tiel evitigis al ili pli grandan katastrofon. Sed la malriĉeco devigis ilin vagadi ĉie. Post la Liberiĝo, kun la senĉesa disvolviĝo de la kolektiva ekonomio, same kiel la aliaj komunumanoj, li kaj liaj familiaĵoj vivas pli kaj pli bone. Ses membroj de lia familio nun loĝas en nova domo kun tri ĉambroj. Lia unua filo laboras kiel traktoristo de la brigado post diplomiĝo en mezlernejo, la dua filo lastatempe estis sendita al la Nordorienta Popola Universitato kiel studento, la tria lernas en gimnazio. Ŝaŭ Boling emociie diris: Dank' al la gvido de Prezidanto Maŭ, ni akiris emancipiĝon, jungis ventegon kaj moviĝan sablon per forstokulturo kaj havas nunan feliĉan vivon. Ni ĉiam sekvos Prezidanton Maŭ por krei pli belan estontecon.

*Riĉa rikolto de fruktoj*







# Prospera Monturbo

BAJ ĜENGVEN

**B**AJSE estas monturbo en Guanghi. La du Riveroj Egiang en sudo kaj Ĉengbihe en oriento fluas preter la urbo kaj kune formas Joŭgiang (aŭ la Dekstran Riveron). En 1929, la Komunista Partio de Ĉinio faris ĉi tie armitan ribelon, organizis la 7-an korpuson de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo kaj fondis revolucionan regpotencon en la areo de Joŭgiang.

En 1930 post kiam la Ruĝa Armeo moviĝis norden, la kuomintangaj reakciuloj okupis la urbon kaj turnis ĝin en surteran inferon. En komploto kun bienuloj kaj kapitalistoj ili akaparis grenojn kaj vendis opion. Krom tio ankaŭ banditoj turmentis la popolon per mortigoj, rabadoj k.a. malbonoj. La laboranta popolo suferis prirabadon kaj perdis siajn familianojn. En la urbo, kiu havis nur pli ol dek mil loĝantojn, estis 56 opifumejoj kaj hazardludejoj kaj kvar prostituejoj. La prezoj plurfoje leviĝis en unu tago kaj inflacio ĉiam regis, malfavore al la popolo. Kontraŭ 50 kg. da brulligno la montanoj povis ricevi nur 4 uncojn da rizo, kontraŭ unu koko nur unu kudrilon kaj kontraŭ 50 kg. da ilicio 0.5 kg. da salo. Kie estas subpremo, tie estas kontraŭstaro: la Bajse-anoj leviĝis por fari heroajn batalojn.

La 5-an de novembro 1949, la popolaj trupoj senditaj de Prezidanto Maŭ revenis al la urbo kaj liberigis ĝin. De tiam, sub la direkto de Maŭzedongpenso, la urbo multe ŝanĝiĝis kun la paso de tempo.

Nun multaj fabrikoj de Longvang en sudo ĝis Dongsun en nordo estas starigitaj. La nove konstruita strato Ĉaŭjang estas larĝa kaj pura. Plenŝarĝitaj kamionoj navete kurantaj sur la ponto super la rivero Joŭgiang kaj ŝipoj en la rivero elportas rizomojn de pseŭdoginsengo, ilicion, aleŭritan oleon, orelfungon, medikamentan materialon, gekon, felojn kaj aliajn produktojn montregionajn.

En socialisma konstruado, la diversnaciecaj popoloj de la monturbo disvolvis la revolucion spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj por disvolvi lokan industrion multe, rapide, bone kaj ekonomie. Antaŭe la urbo bezonis provizadon de aliaj lokoj eĉ per alumeto kaj sapo, sed nun ĝi mem produktas elektrajn motorojn, akvoturbinojn, ilmaŝinojn kaj aliajn. La Bajse-a Fabriko de Elektraj Motoroj kun simpla ekipaĵo kaj malgrandaj teknikaj fortoj sukcesis produkti 22 specojn de motoro dank' al plena dis-

*Kamionoj transportas al aliaj lokoj ĉiutagajn bezonajojn kaj agrikulturajn maŝinojn produktitajn de Bajse.*



*Produktaĵoj de la Bajse-a Fabriko de Elektraĵ motoroj*





volvo de la aktiveco de la laboristoj kaj teknikistoj, la teknika renovigo kaj teknika revolucio. Utiligante lokajn krudmaterialojn la laboristoj de la Bajse-a Kemisterka Fabriko sukcesis produkti sintezan amonion kaj ekstrakti benzinon, fenolojn k.a. el bruna karbo, kaj per tio ili faris sian kontribuon en disvolvo de kemisterka industrio kaj sin-teza utiligo de bruna karbo. Nun en Bajse funkcias pli ol cent industriaj kaj minaj entreprenoj. La rapida disvolviĝo de la loka industrio kreis kondiĉojn por efike subteni la agrikulturan pliprodukton.

Ankaŭ grandaj progresoj okazis al la kulturaj kaj edukaj aferoj en Bajse. Nun troviĝas tie 54 lernejoj elementaj kaj mezgradaj, kaj ankaŭ mezgradaj teknikaj lernejoj kaj alta lernejo. Ĉiu infano povas eniri lernejon. Antaŭ la Liberiĝo nur infanoj de bienuloj kaj kapitalistoj povis viziti altan lernejon kaj en la tuta urbo estis nur 14 studentoj. Nun, la infanoj de laboruloj havas eblecon viziti altan lernejon, kaj sole sur la strato Vejdong estas 64 studentoj finintaj studon. La dua mezlernejo de Bajse situanta sur la strato Giefang, kie estis la stabejo de la 7-a Korpuso de la Ruĝa Armeo antaŭ 40 jaroj, havas lernantojn kvaroble pli multajn ol antaŭ la Liberiĝo. Ankaŭ ĝia eduka ekipaĵo estas sufiĉe kompleta. La revolucia komitato de la lernejo konstante atentis pri dono de

edukado al la instruistoj kaj lernantoj pri revolucia tradicio por levi ilian ideologion kaj politikan konscion. Kaj nova generacio de homoj kun socialisma konscio kaj klareco estas en sana kreskado.

Tri hospitaloj kun bonaj ekipaĵoj nun funkcias en Bajse, kiuj ne nur zorgas por preventi kaj kuraci malsanojn en la urbo, sed ankaŭ sendas kuracgrupojn al foraj montregionoj por priservi tieajn komunumanojn. La ŝtataj oficistoj kaj laboristoj ĝuas kuracajn prizorgojn senpage kaj ĉiuj fabrikoj, produktaj brigadoj kaj loĝkvartaloj havas sian higienan stacion. La sano de la popolo estas efike sekurigata. La 3-an de aŭgusto 1970, Lu Tian-guang, knabo el Vucun-komunumo de Tianjang-gubernio, suferis de spina tuberkulozo kaj svenis jam 36 horojn. Kiam li estis sendita al hospitalo, ĝia revolucia komitato tuj organizis kuracistojn por savo kaj lin sukcese resanigis.

La Bajse-anoj propraokule vidis la ŝanĝiĝon de la monturbo kaj esprimis sian emociiĝon per jena kanto:

*Senfine la rivero Joŭgiang daŭre fluas;  
La ruĝa suno alte verŝas or-radiojn.  
Pro la feliĉo al Maŭ Zedong ni vivuas,  
Por ĉiam sekvas ni la Ĉinan Kompartion.*



## Renovigo de Ordinara Tornilo

ĜANG GUOLIANG

**M**I estas tornisto de la Ĉangĉun-a Unua Aŭtofabriko. En 1958, mi komencis studi filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj en la praktiko dum la pasintaj dekkelkaj jaroj mi kaj miaj kamaradoj efektivigis pli ol 100 teknikajn renovigojn, inter kiuj 12 estas disvastigitaj tra la tuta lando.

Antaŭe nia laborejo havis nur ordinarajn tornilojn. Foje, ni akceptis taskon de prilaborado de

maldikaj longaj latunaj ŝaftoj. Iuj diris ke laŭ difino en libro ordinara tornilo ne taŭgas por prilaborado de preciza maldika longa ŝafto. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ "**Senhalte malfermi vojon al la konado de vero en la praktiko**", mi faris seriozan analizon pri la aserto ke ordinara tornilo taŭgas nur por prilabori ŝafton dikan mallongan sed ne maldikan longan. Mi pensis, ke oni povas prilabori dikan mallongan ŝafton per ordinara


tornilo ja pro multjara praktiko. Sed oni neniam praktikis prilaboradon de maldika longa ŝafto per tia tornilo, tial oni ankoraŭ ne mastris la leĝon pri tio. Mi decidis mem provi kaj eltrovi ĝin.

Mi fiksas sur mia tornilo maldikan longan ŝafton kun dikeco de cigaredo. Mi ektornis ĝin, sed ĝi senĉese vibras kiel kordo. La kvalito de la prilaboraĵo ne atingis la normon, ĉar la postulata precizeco estas tre alta. Mi alprenis rimedojn por solvi la problemon, sed ne sukcesis. Mi pensis, ke oni ne devas agi sencerbume, sed devas **“rearanĝi kaj rekonstrui la perceptaĵojn”** kaj trovi la kaŭzon de la malsukceso. Mi atenteme kontrolis kaj mezuris la prilaboraĵojn kaj faris komparon inter ili kaj trovis ke ĉe ĉiuj iliaj ambaŭ ekstremoj estas laŭnormaj partoj, kiuj estas kaj glataj kaj rektaj. La kaŭzo kuŝas en tio, ke dum la prilaborado, ambaŭ ekstremoj de la ŝafto estas fiksitaj sur la maŝino per ĉuko kaj centropintaĵo, tial la vibrado estas malforta. Sed ĝia meza parto vibras forte dum la tornado, kio difektas la laboraĵon. Se oni povas krei certajn kondiĉojn por malfortigi la vibradon, la prilaborita ŝafto kredeble atingos la normon. Por trovi necesan rimedon kiel eble plej rapide, mi iris al aliaj fabrikoj

por lerni de ili. Iun tagon, mi vidis ke kiam tornisto prilaboras maldikan ŝafton, li aldonas moveblan malgrandan subtenilon ĉe ĝia meza parto kaj tiel la ŝafto estas senŝanceliĝa. Tio multe inspiris min. Mi pensis, se mi instalus la subtenilon ĉe la tranĉilo, ke ĝi ĉiam moviĝu sekvante la tranĉilon, ĉiu parto de la prilaborata ŝafto restos senŝanceliĝa. Laŭ tiu principo mi projektis kaj fabrikis tranĉilan subtenilon. Post tio vibrado ne plu okazis kiam mi tornis maldikajn longajn ŝaftojn. Prilaborado de unu tia ŝafto bezonis nur 30 minutojn kaj ankaŭ la kvalito estis laŭnorma. Mi plue faris multajn provojn kaj plibonigojn al mia tranĉila subtenilo dum la praktiko, ke ĝia strukturo ankoraŭ pli konformu al la uzado. Nun mi jam povas prilabori precizajn maldikajn longajn ŝaftojn kun diversaj karakteroj per ordinara tornilo.

Poste, ni akceptis prilaboran taskon de maldikaj longaj olecilindroj, kies interno devas esti glata kiel spegulo. En la pasinteco, ordinara tornilo ne prilaboris tiajn olecilindrojn. Ĉifoje, ni decidis plenumi tiun taskon per ordinara tornilo, ĉar la specialaj ilmaŝinoj estis plenumantaj alian novan taskon. Mi cerbumis tagnocte kaj interkonsiligis

*Kamarado Ĝang Guoliang kaj laboristoj kune faris tranĉilan subtenilon por torni maldikajn longajn ŝaftojn.*





kun miaj kamaradoj multfoje kaj fine projektis kaj fabrikis rulpremilon por prilabori olecilindron. Sed, sinsekvaj tri provoj ĉiuj malsukcesis. Iu admonis min: “Ja neniuj uzis tiun rimedon por prilabori tiajn olecilindrojn antaŭe, ĉesu do!” Mi pensis: rulpremilo ja estas novaĵo, kaj “**ĉiu ajn novaĵo trapasas malfacilan kaj zigzagan vojon en sia kreskado**”. Ankaŭ en la praktika procezo de fabrikado kaj aplikado de rulpremilo devas aperi sukcesoj kaj malsukcesoj. Je ĉiu gajnita sukceso, mi rikoltis sperton kaj pliproksimiĝis al la venko je unu paŝo; se mi renkontis unu malsukceson, tio signifis, ke mi neis mian eraron kaj same pliproksimiĝis al la venko unu paŝon. Nur dank’ al ripetada praktiko oni povas mastri la leĝojn de disvolviĝo de aferoj. Tiuj komprenajoj plifortigis mian memfidon. Mi ekprenis la rulpremilon kaj la misfari-tajn olecilindrojn kaj ekzamenis ilin unu post alia. Post komparo kaj analizo mi trovis ke ĉiu el la tri provoj pliproksimiĝis al sukceso. Sur tiu bazo mi persistis en ripeta praktiko kaj senĉesa plibonigo kaj fine fabrikis alian rulpremilon. Sed, dum la prova uzado aperis nova problemo: la mezuro de la prilaborita olecilindro estis nepreciza kaj montriĝis misformiĝo, kio okazis pro la metala elasteco.

Por bone koni la metalan flekseblecon kaj eltrovi precizajn donitaĵojn pri la misformiĝo, mi kolektis eluzitajn ŝtaltubojn kun diversaj kalibroj kaj provis ilin sur la maŝino unu post alia. Mi observis la staton de ilia misformiĝo kaj notis la koncernajn donitaĵojn. Post centoj da provoj en pli ol 30 noktoj, mi ellaboris kompare precizan tabelon de donitaĵoj pri la fleksiĝo de diversaj olecilindroj kaj fine sukcesis en apliko de la rulpremilo. Ordinara tornilo jam povis ludi la rolon de speciala ilmaŝino. Post tiu teknika renovigo mi komprenis: oni povas turni malvenkon en sukceson kaj atingi la atendatan rezulton, nur se li mastris la leĝojn de disvolviĝo de la aferoj en la ripeta praktikado.

Poste, por solvi diversajn malfacilajn problemojn dum tornado, mi kaj aliaj laboristoj de nia grupo plue faris dekelkajn teknikajn renovigojn post penema studo kaj multfoja eksperimento. Nun nia ordinara tornilo jam ludas rolon de pluraj specoj de specialaj precizaj ilmaŝinoj kiaj polura maŝino, koordinata alezilo, spirala frotum-maŝino, preciza spiralaŝafta tornilo kaj granda frezmaŝino, kaj per tio ni pliapaŝe ekspluatit la latentajn fortojn de la ekipaĵo kaj kreis pli multe da riĉaĵo por la socialisma konstruado.



*La verkinto de tiu ĉi artikolo (meze) rakontas al laboristoj sian komprenon en studo de la filozofia verko de Prezidanto Maŭ Pri Praktiko.*

# *Princino Fatemeh Pahlavi kaj Aliaj Honorindaj Iranaj Gastoj kaj Sinjorino Rahim Khan Vizitis Sudan Ĉinion*

Princino Fatemeh Pahlavi de la Irana Reĝlando kaj ŝia sekvantaro inkluzive de sinjorino Leila Hoveyda, edzino de la irana ĉefministro kaj kune kun ili ankaŭ la edzino de Marŝalo Abdul Rahim Khan, la ĉefkomandanto de la Pakistana Aera Forto, vizitis la ĉinajn urbojn Ŝanhajo, Nankino, Hangĝoŭ, Ĉangŝa, Kantono kaj aliaj. Ili estis varme bonvenigataj ĉie, kien ili venis.

Princino Fatemeh Pahlavi kaj aliaj honorindaj iranaj gastoj kaj la edzino de Marŝalo Abdul Rahim Khan vizitas laboristan hejmon en Ŝanhajo.







Infanoj de la infangardeno de la nova laborista kvartalo Pengpu de Ŝanhajo kantas por bonvenigi Princinon Fatemeh Pahlavi.




Princino Fatemeh Pahlavi vizitas te-kultivejon de Hihu-komunumo en Hangĝoŭ.



La honorindaj gastoj en la ripozejo ĉe la fonto Hupaŭ en Hangĝoŭ.





Kiam Princino Fatemeh Pahlavi vizitas Lingjin-templon en Hanggou, ŝi estas varme bonvenigata de popolamasoj.



La honorindaj gastoj rigardas orfiŝojn en la Okcidenta Lago de Hangĝoŭ.

Honorindaj iranaj gastoj prezentas programeron en bankedo.







Princino Fatemeh Pahlavi kaj aliaj honorindaj iranaj gastoj kaj la edzino de Marŝalo Abdul Rahim Khan sur la Nankina Pontego super Jangzi-rivero.

Princino Fatemeh Pahlavi kaj aliaj honorindaj iranaj gastoj kaj la edzino de Marŝalo Abdul Rahim Khan speciale vizitis Ŝaŭŝan — la hejmvilaĝon de Prezidanto Maŭ. La bildo montras, ke ili rigardas la muzeon de la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ.





# Floras la Amikeco inter la Popoloj de Ĉinio kaj Koreio

**E**N la sezono de pompa florado, ĉarme floras aroj kaj aroj da helruĝetaj floroj kimdalaj (*Rhododendron obfusum*) tra la 3,000-lia bela lando de Koreio. Tamen plej belaj kaj plej amindaj estas la floroj de la batala amikeco en la koro de la ĉina kaj korea popoloj irigaciitaj per sango. Ĉiu ĉina kamarado vizitanta Koreion dronis en la batala amikeco inter la ĉina kaj korea popoloj ĉie, ĉu en la revolucia ĉefurbo Pjongjango aŭ en fora kamparo, ĉu ĉe la longaj orienta kaj okcidenta marbordoj aŭ sur la vasta ebenejo, ĉu ĉe la frontaj pozicioj ĉe la norda latitudo 38° aŭ en postfronta bazo.

La amikeco inter la ĉina kaj korea popoloj havas longan historion. Frue en la malfacilaj jaroj de la Unua Enlanda Revolucia Milito (1924-1927) kaj la Agrara Revolucia Milito (1927-1937) de Ĉinio, koreaj kamaradoj jam batalis kune kun la ĉina popolo. En la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito, nemalmultaj eminentaj gefiloj de la korea popolo verŝis sian sangon sur la ĉinan teron por subteni la liberigan aferon de la ĉina popolo. Ĝi neniam forgesos tiun internaciisman helpon de la korea popolo.

En 1950, kiam la usona imperiismo lanĉis agresan militon kontraŭ Koreio, la ĉina kaj korea popoloj refoje batalis kune kontraŭ la usonaj agresantoj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la Ĉinaj Popolaj Volontuloj varme amis la korean popolon same kiel siajn sangfratojn kaj defendis la montojn kaj riverojn de Koreio same kiel sian patrolandon. Por la komuna venko, kun koreaj kunbatalantoj ili kune batalis kuŝante sur neĝo kaj glacio kaj kune sturmis malamikojn. Laŭ la instruo de Ĉefministro Kim Il Sen, la korea popolo rigardis la Ĉinajn Popolajn Volontulojn kiel siajn trupojn. Spite de malfaciloj aŭ danĝeroj, pafado aŭ frostego ili tagnokte ripar-

pontojn kaj ŝoseojn, transportis grenon kaj municion, lavis vestaĵojn kaj urĝsavis vunditojn fronte aŭ postfronte. Iuj el ili oferis eĉ sian karan vivon por savi kaj protekti ĈPV-batalantojn.

En Vensan, avo Kim Taj Ven oferis sian filon por savi ĈPV-vunditon. Lia domo situas en kooperativa agrokultivejo de Cen San Li en la gubernio Kim Hua de la provinco Kan Ven. Tie estas grava komunika kruciĝejo. Siatempe preterpasante tie, ĉinaj volontuloj ofte ripozis en la domo de avo Kim Taj Ven. Se ĉinaj volontuloj ne konis vojon, li helpis ilin kiel voĵgvidanto. Poste li kaj liaj du filoj partoprenis brankardan taĉmenton. Ĉar estis tre malfacile transporti vunditon de sur monto per brankardo, li do portis dorse. En la tagoj kiam li servis kiel brankardoportanto, lia frato kaj la edzino de lia pliaĝa filo estis bombe mortigitaj de usona aviadilo. Ili enterigis la kadavrojn de siaj familianoj kaj denove iris porti ĈPV-vunditojn per brankardo. Kiam lia dua filo Kim Ĝon Hua portis ĈPV-vunditon per brankardo kaj renkontis bombadon de malamikaj aviadiloj, li sin ĵetis sur la vunditon, tiel savis la lastan sed li mem glorie oferis sian vivon. Avo Kim Taj Ven diris: "Kiam mi aŭdis tiun informon, mi estis tre ĉagrena tamen tre fiera. Ĉar mia filo mortis por ŝirmi ĈPV-vunditon, tial lia morto estas glora." Avo Kim Taj Ven nun jam havas aĝon de pli ol 70 jaroj, li tamen esprimis al ĉiuj ĉinaj kamaradoj lin vizitantaj ke li ankoraŭ strebados por plifortigi la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Koreio.


En la malfacilaj tagoj de la Patrolanda Liberiga Milito de Koreio, ĉiu persono aŭ familio, kiu batalis kune kun ĈPV, havas vivecan historion pri la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Koreio. La gajninto de triaklasa naciflaga ordeno avino Ham



Ĝej Bo zorge flegadis ĈPV-vunditojn en la longa daŭro de tri jaroj. Ŝi loĝis en Ŝin Pin Li de la gubernio Hi Paŭ, la provinco Kan Ven. Iutage ŝi vidis ke iu kamaradino de ĈPV-hospitalo iras al la rivero kunportante grandan pakon. Ŝi demandis la lastan kion ŝi portas. La kamaradino ne respondis kaj plue paŝis rekte antaŭen. Avino Ham kuratingis ŝin, deprenis la pakon kaj trovis vestaĵojn trempitajn de sango. Ŝi tre ĉagreniĝis kaj helpis la kamaradinon lavi ilin. Ju pli longe ŝi lavis, des pli ŝi malamis la usonajn piratojn kaj decidis bone labori por subteni la fronton. Ŝi eĉ petis por akcepti ĈPV-vunditojn en sian domon por flego. Kaj por pli frue resanigi la vunditojn, spite de bombado de malamikaj aviadiloj, ŝi iris kelkdek liojn por aĉeti pomojn por la vunditoj. Post reveno ŝi manĝigis al la vundi-

toj tranĉaĵon post tranĉaĵo. Kun larmoj en la okuloj la vunditoj diris emocie: “Kvankam niaj patrinoj ne estas ĉe ni, tamen vi estas pli intima al ni. Por rekompenci vian atentan prizorgon al ni, ni nepre ekstermos, post la resaniĝo, pli multe da usonaj agresantoj por venĝi la korean popolon.” Unu grupo da vunditoj foriris, alia venis — tiel avino Ham flegis ĈPV-vunditojn en sia hejmo dum tri jaroj. Nun, avino Ham laboras en infanĝardeno kaj ofte rakontas al la infanoj pri ĈPV. Ŝi diris: “Ni daŭrigos generacion al generacio la amikecon el sango inter la popoloj de Ĉinio kaj Koreio.”

Jes ja, la batala amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Koreio estas fidinda garantio en la batalo de la du popoloj kontraŭ la komuna malamiko kaj por ĝia venko kaj tiu amikeco vivos eterne.



*Laborantino de la Muzeo de la Korea Patrolanda Liberiga Milito rakontas al geknaboj la heroan agon de Huang Giguang, eksterordinara meritulo de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj.*

# Komuniko pri Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko

La 10-a de julio de 1971, Pekino

**P**OR prepari la Tablotenisan Amikecan Invitan Turniron de Azio kaj Afriko, sinjoroj Kim Rjong Man, Son Kil Ĉon kaj Ro Dong Njon, delegitoj de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, sinjoroj Koĵi Goto, Kĵunej Muraoka, Ŝiro Ocu kaj Roiĉi Ando, delegitoj de Japanio, sinjoroj C. H. L. Yiptong kaj J. O. Lefebure, delegitoj de Maŭricio, sinjoroj Hemanta Rana kaj Nripendra Singh, delegitoj de la Nepala Reĝlando, sinjoroj Yehia Abou Heif, Abdel Kader Fahmy kaj Salaheldin Kheir Eldin, delegitoj de la Unuigita Araba Respubliko kaj sinjoroj Ĝaŭ Ĝenghong, Song Ĝong kaj Ĝuang Zedong, delegitoj de la Ĉina Popola Respubliko, okazigis preparan kunvenon en Pekino de la 9-a ĝis la 10-a de julio 1971. La kunveno iris en atmosfero de unuiĝo kaj amikeco kaj post plena diskutado atingis unuanimecon pri diversaj aferoj de la prepara laboro.

La kunveno decidis okazigi la Tablotenisan Amikecan Invitan Turniron de Azio kaj Afriko de la 3-a ĝis la 13-a de novembro, 1971, en Pekino.

La invita turniro celas plifortigi la amikecon inter la popoloj kaj tablotenistoj de la aziaj kaj afrikaj landoj kaj akceli la disvolviĝon de tabloteniso en Azio kaj Afriko. Tiu ĉi spirito traĭros

la organizan laboron kaj ĉiujn aliajn aktivadojn de la invita turniro.

La invita turniro entenos naŭ eventojn: vira teama konkurso, virina teama konkurso, vira unuopa konkurso, virina unuopa konkurso, vira duopa konkurso, virina duopa konkurso, miksita duopa konkurso, knaba unuopa konkurso kaj knabina unuopa konkurso. Por ke la sportistoj de diversaj landoj havu pli multajn ŝancojn interŝanĝi sperton kaj plifortigi la amikecon kaj interkomprenon, kuna ekzercado estos organizita por 4 aŭ 5 tagoj antaŭ la konkursado.


La kunveno decidis, ke la iniciataj landoj kune sendos invitilojn frue al ĉiuj tablotenisaj asocioj de la landoj aŭ regionoj en Azio kaj Afriko, kiuj subtenas la celon de la invita turniro. La invitatoj jam estas unuanime aprobitaj de la ses iniciataj landoj.

La kunveno esperas, ke la tablotenisaj asocioj de la aprobitaj landoj aŭ regionoj en Azio kaj Afriko varme respondos al la invito. La kunveno kredas, ke la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko certe faros sian farendan kontribuon al la akcelo de la amikeco kaj unuiĝo kaj al la disvolviĝo de sportoj de la popoloj de Azio kaj Afriko.



ĜAŬ LIANG:

# Vizito al la Kantona Instituto de Kampana Movado




**E**N 1926, kamarado Maŭ Zedong fondis en Kantono instituton de kampana movado kaj sin ŝarĝis per ĝia direktoro. Tie li kulturis grandan nombron da eminentaj kadroj por la kampana revolucia movado de nia lando.

La antaŭa sidejo de la instituto situas ĉe la mezo de Ĝongŝan-strato, Kantono. Antaŭ nelonge ni vizitis ĝin.

## KULTURO DE DISSEMANTOJ DE REVOLUCIA VERO

Irinte en la ŝtonan pordon, trapasinte la pon-

teton kaj korton, ni vidis la unuan vicon de domoj. Kvinta ĉambreto oriente de la trairejo estis oficejo kaj loĝejo de Prezidanto Maŭ Zedong siatempe. En la ĉambro meblita simple kaj senlukse, troviĝas ligna lito kaj ĉe ĝia fronto staras du bambuaj korboj produktitaj de Hunan-provinco. En ili amasiĝas, kiel antaŭe, multaj ĵurnaloj kaj gazetoj siatempe eldonitaj. Apud fenestro, kiu oblikve frontas al la lito, staras skribotablo kaj liana seĝo. Sur la tablo kuŝas skribiloj. Laŭ rememoro de iuj antaŭaj lernantoj, ĝuste en tiu ĉambreto kamarado Maŭ Zedong siatempe korektis ekzercojn de lernantoj, redaktis *Gazeton pri Kampana Problemo* por gvidi kaj antaŭenpuŝi la ĉinan revolucion.



*La antaŭa Kantona Instituto de Kamparana Movado.*

Sur la muro de ekspozicia ĉambro pendis tabelo, kiu montras 20 provincojn kaj regionojn tra la tuta lando de kie venis 327 lernantoj. Ili ĉiuj estis aktivuloj de kamparana movado en diversaj lokoj aŭ progresemaj junuloj, kiuj volis sin dediĉi al la kamparana movado kaj estis senditaj de partiaj organizoj de diversaj lokoj al la instituto por lerni revolucion veron rompinte obstaklojn de reakciuloj.

Tiu revolucia lernejo disvolvis la revolucion lernostilon de kombiniĝo de teorio kun praktiko, por kiu pledas kamarado Maŭ Zedong. Tie Prezidanto Maŭ Zedong ne nur persone lekciiis pri ĉefaj lecionoj kiaj “analizo de la klasoj en la ĉina socio”,

“problemo de la ĉina kamparanaro” kaj “eduko en kamparo”, sed ankaŭ gvidis lernantojn partopreni ardan revolucion batalon por fari enketon kaj praktikon. Sub la nutrado de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, la lernantoj rapide kreskis en dissemantojn de revolucia vero.

#### **BRILA DOKUMENTO LUMIGAS LA VOJON**

Antikva konstruaĵo en la korto de la instituto estas lekcia ĉambro siatempa. Sur la fronta muro pendas portretoj de Marks, Engels kaj Lenin. Malantaŭ la podio staras nigra tabulo kaj antaŭ



ĝi la instruista tablo, kontraŭ kiu estas pli ol 60 tabloj kaj benkoj por lernantoj. Tie kamarado Maŭ Zedong persone lekciis al la lernantoj pri “analizo de la klasoj en la ĉina socio”, kiu estas leciono ĉiam memorata por la lernantoj, kiel brila lumturo lumigas iliajn korojn kaj havigis al ili batalan armilon sur la revolucia vojo. Dank’ al tio ili ekkomprenis doktrinon de Marksismo pri klasbatalo kaj ellernis observi kaj solvi la problemojn en la ĉina revolucio per marksisma klasa analizo.

En 1926, kiam la revolucio profunde disvolviĝis, la kuomintangaj dekstruloj kun Ĉiang Kajŝek kiel la ĉefo sinkaŝantaj en la unueca fronto estis konspirantaj por subfosi la revolucion kaj uzurpi ĝian gvidantecon. Tiam, rilate al la problemoj kiel trakti la revolucion gvidantecon, en la Komunista Partio de Ĉinio ekzistis dekstraj oportunistoj reprezentataj de Ĉen Duhju, kiuj opiniis, ke la revolucia gvidantecon devas esti cedita al la burĝaro, kaj atentis nur kunlaboron kun Kuomintango sed forgesis la kamparanojn. Kaj samtempe en la Partio ekzistis “maldekstraj” oportunistoj reprezentataj de Ĝang Guotaŭ, kiuj kvankam rekonis sur la lipoj la gvidantecon de la proletaro super la ĉina revolucio, tamen malestimis la kamparanojn kaj neis iliajn pozicion kaj rolon en la revolucio. Ĉe la kriza momento de la ĉina revolucio, kamarado Maŭ Zedong faris trafan kaj profundan analizon pri la rilatoj de la klasoj en Ĉinio per marksismaj-leninismaj bazaj principoj kaj en marto de 1926 verkis la brilan dokumenton *Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio*. En tiu verko li korekte solvis la gravan problemon de la revolucio ke la ĉina revolucio devas esti gvidata de la proletaro kaj la kamparanoj estas la plej fidinda alianco, eksplikis karakteron, taskojn, movforton kaj disvolviĝan direkton de la ĉina revolucio, ĝisfunde kritikis dekstran kaj “maldekstran” oportunismojn tiam ekzistantajn en la Partio, kaj montris por la ĉina revolucio vojon de antaŭenmarŝo.

### PERSISTO EN ARMITA Batalo

La orde vicigitaj pafiloj kaj instrumentoj en loĝejoj de la lernantoj montras, ke la instituto estas ne nur granda politika lernejo por studi Marksismon-Leninismon, sed ankaŭ lernejo kun militista stilo. Por ke la lernantoj posedu militartojn kaj fariĝu propagandistoj, organizantoj kaj gvidantoj de la kamparana revolucia armita batalo, Prezidanto Maŭ ofte instruis al la lernantoj la veron pri konduko de pinto-kontraŭ-pinta batalo en revolucio, organi-

zis ilin en severa milita ekzercado kaj en vivo de unuiĝo, streĉeco, seriozeco kaj vigeleco.

Inter la ekspoziciataj objektoj ni ŝajne vidus la scenon de la tiama streĉa vivo de milita ekzercado de la lernantoj: Ĉe la tagiĝo la laŭta klariono vekis la lernantojn. Sin vestinte per uniformoj, krurobandaĝoj kaj sandaloj kaj kun pafilo, la lernantoj en vicoj vigelece kuris al la orienta placo por milita ekzercado.

La granda instruanto Lenin diris: “**La fundamenta problemoj de ĉiuj revolucioj estas tiu de ŝtatpotenco. Sen klara kompreno pri tio ne povas esti parolo pri memkonscia partopreno en revolucio, des pli pri gvido super la revolucio.**” Dank’ al edukado pri militaj aferoj kaj milita ekzercado, la lernantoj posedis la brilan penson oponi kontraŭrevolucion armitan batalon per revolucia armita batalo, formis en si bravan kaj obstinan revolucion volon de peniga lukto, ellernis militartojn por ekstermi malamikojn kaj fariĝis modeloj en kaptado de ŝtatpotenco per armita forto.

### DE SOLA FAJRERO AL VENKO

Iu giganta ole-pentraĵo en la instituto tiel altiris nian atenton, ke ni ne volis ĝin forlasi. Tiu ole-pentraĵo prezentis la subliman scenon, ke la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ sendis tiam la lernantojn surpaŝi la revolucion vojon. En septembro 1926, por renkonti la baldaŭ venontan altan tajdon de kamparana movado en la tuta lando, la lernantoj de la Kantona Instituto de Kamparana Movado iris al kamparoj de diversaj lokoj tra la tuta lando, kie ili armis la vastajn kamparanajn amasojn per revolucia teorio kaj organizis kamparanajn asociojn kaj kamparanajn memdefendajn gvardiojn. Ĝis junio de 1927, 15 provincoj kaj regionoj en la tuta lando havis kamparanajn asociojn, kies membroj nombriĝis je pli ol 10,000,000 homoj. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ Zedong diris: “**Centmilionoj da kamparanoj leviĝos. . . kvazaŭ uragano kaj pluvego kun impeto tiel rapidega kaj fortega, ke nenia giganta forto povos ilin reteni.**” “**Ili entombigos ĉiujn imperiistojn, militaristojn, koruptiĝintajn ŝtatoficistojn, lokajn tiranojn kaj malbonajn biensinjorojn.**”

Sub la ĝusta gvido de Prezidanto Maŭ Zedong, impete disvolviĝis la laborista-kamparana movado en la tuta lando. La kadroj lernantaj tiam en la instituto faris meritojn por renversi la regadon de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kuomintangaj reakciuloj kaj batalgajni la venkon de la tuta lando.



# Brakhorloĝo Falinta de sur Rapida Vagonaro

**E**N la deĵorejo de la Liuĝoŭa Fervoja Stacio en Guanghai, iu pasaĝero maltrankvile rakontis al deĵorantino Liaŭ Suhua, kiel lia nova brakhorloĝo falis de sur la vagonaro.

La pasaĝero, nomata Ĉen Hehin, estis veturanta per la vagonaro tra Liuĝoŭ al Gujlin. Kiam la vagonaro estis baldaŭ atingonta Liuĝoŭ, li iris en necesejon kaj neatente faligis sian brakhorloĝon sur la fervojon.

Aŭdinte la rakonton de la pasaĝero, Liaŭ Suhua tuj diris senhezite: “Jes! Ni faros ĉion eblan por trovi ĝin por vi.” “Bonvolu doni al mi vian nomon kaj adreson! Ĝin trovinte, mi tuj sciigos al vi.” Kaj poste Liaŭ Suhua varme helpis la pasaĝeron preni vagonaron por daŭrigi sian veturadon.


Liaŭ Suhua juĝis laŭ la rakonto de la pasaĝero, ke la horloĝo eble falis sur la trakon proksime de la ŝtona minejo de Bajŝan. Ŝi tuj telefonis al la stacio kaj policejo ĉe la ŝtona minejo, ke oni helpu serĉi la horloĝon. Laborantoj de la diritaj unuoj tuj iris al la proksimaj partoj de la fervojo por serĉado, sed ne trovis ĝin. Fakte la horloĝo jam estis rimarkita kaj forprenita de Haŭ Hujping kaj aliaj 3 ruĝaj gvardianetoj de la Fervoja Elementa Lernejo de Bajŝan. Ĉar ili ne povis trovi la perdinton, ili ĝin donis al la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso en la lernejo, kaj tiu ĉi poste transdonis ĝin al la stacio de Lajbin.

Informiĝinte pri la supre dirita okazaĵo en la sekvinta tago, Liaŭ Suhua volis tuj telefoni al Gujlin por sciigi la perdinton de la horloĝo, sed ŝi pensis ke Gujlin estas pli ol

200 kilometrojn fore de Lajbin kaj la perdinto devus elspezi kaj tempon kaj monon, se li venus speciale por preni la horloĝon. Kaj krome, ŝi ne estis certa pri tio ĉu la horloĝo estas la lia. Ŝi do skribis leteron al la perdinto petante, ke la lasta sendu la fakturon de la horloĝo al Lajbin-stacio por kontrolo.

Post kontrolo oni konstatis, ke la horloĝo trovita de la ruĝaj gvardianetoj ĝuste apartenas al la perdinto Ĉen Hehin. Sekve la policejo de la stacio komisiis al policano sur vagonaro veturanta tra Gulin, ke la lasta transdonu la horloĝon al la perdinto.

Ricevinte la horloĝon, Ĉen Hehin tre emociiĝis. Li diris: “Mi pensis, ke ĝi jam estas ne retrovebla. Sed nun vi retrovis kaj persone portis ĝin al mi. Ja ĉiam lerninda por mi estas via vere komunisma moralo.”





JEGIN:

# Sinteza Utiligo

## de Karbo

**L**A Ĝenerala Kemia Fabriko de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio, kies ĉefa produktaĵo estas metalurgia koakso, jam havas historion de pli ol 50 jaroj. Ĝi aktive disvolvis sintezan utiligon de karbo kaj akiris relative bonan rezulton. En la lastaj jaroj, krom plenumo de la ŝtata plano en produkto de metalurgia koakso, ĝi senĉese altigis sian povon en rehavigo kaj rafinado de kemiaĵoj kaj rapidege plimultigis kromproduktojn dum koaksigo. Ĝis la fino de 1970, la specoj de tiaj produktaĵoj de tiu fabriko jam superis cent. 50 novaj produktaĵoj estas sukcese produktitaj en la periodo de 1968 ĝis 1970.

### PLENA DISVOLVADO DE PRODUKTOJ KUN UNU KIEL LA ĈEFA

El karbo oni povas produkti koakson, kiu estas grava materialo en produkto de fero kaj ŝtalo. Dum farado de koakso, produktiĝas samtempe granda nombro da kemiaĵoj, kiuj estas fundamentaj materialoj uzataj por produkto de sinteza plasto, sintezaj fibroj, sinteza kaŭĉuko, kemisterko, insekticidoj, medikamentoj, laksubstanco, farboj k. a. bezonataj en nacidefenda kaj aliaj industrioj, agrikulturo kaj popola vivo. Tial sinteza utiligo de karbo estas grava tasko en konstruado de socialismo.

En printempo de 1968, sub la gvido de la revolucia komitato, la vastaj amasoj de laboristoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj teknikistoj de la fabriko serioze studis la serion de instruoj de Pre-

zidanto Maŭ pri sinteza utiligo de materialo, kaj ĝisfunde likvidis la krimojn de la kliko de Liu Ŝaŭki en subfosado de plena disvolvado de koaksiga industrio. Membroj de la revolucia komitato profundigis en produktejojn por fari esploron kaj enketon, vaste aŭskultis opiniojn de laboristaj amasoj, ellaboris planon por sinteza utiligo de karbo kaj levis ardan kampanjon por tiu afero en la fabriko.

En disvolvado de sinteza utiligo de karbo, tiu fabriko persistis en la principo de plena disvolvado de produktoj kun unu kiel la ĉefa, plifortigis la administradon en la sistemoj de farado de koakso kaj de rehavigo kaj rafinado de kemiaĵoj. Samtempe kun senĉesa altigo de la kvanto kaj la kvalito de koakso, ĝi pliapaŝe altigis sian povon en rehavigo kaj rafinado de kemiaĵoj, tiel ke grandmezure kreskis la produkto de kemiaĵoj. Krom tio, ĝi plivastigis sian produkton per utiligo de rekrementoj kaj forĵetataj likvaĵoj kaj gasoj en produkto, kaj akiris rimarkindan atingon en turnado de forĵetataj en trezorojn kaj de malutilaĵoj en utilaĵojn. En la pasinteco, la fenola rekremento de tiu fabriko estis forĵetita kune kun aliaj rekrementoj en grandan foson, kie fariĝis vasta "olea maro". Nun, per siaj propraj manoj, la laboristoj konstruis kompletan ekipaĵon por prilabori fenolan rekrementon kaj ĉiujare povas produkti ĉirkaŭ 200 tunojn da fenolaj produktaĵoj. En la lastaj jaroj, sole el fenola, piridina kaj kinolina rekrementoj oni jam produktis 15 kemiajn kromproduktaĵojn.



### **KOMBINO DE SCIENCA ESPLORO, PROVPRODUKTO KAJ PRODUKTO**

Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, sub la influo de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki pledanta por “administrado de fabrikoj per specialistoj” kaj “tekniko la unua”, iuj teknikaj laborantoj de la fabriko tuttage sidis en sia laboratorio, fosis en fremdlandaj literaturoj, manipulis glasajn botelojn kaj tubojn kaj sin okupis pri skribado de eksperimentaj raportoj. Pro disiĝo de politiko, amasoj kaj produktado, ili sidadis tie dekelkajn jarojn sen ajna atingo. Eĉ kiam iuj sukcesis elfari iajn novajn produktaĵojn en laboratorio, tiuj atingoj tamen restis en raportoj aŭ en boteloj kaj tre malmultaj el ili estis utiligitaj en pogranda produktado.

Post la starigo de la revolucia komitato de la fabriko, fondiĝis teknik-renoviga grupo de triflanka kombiniĝo, kun laboristoj kiel la ĉefa parto kaj partopreno de kadroj kaj teknikaj laborantoj. Pli ol 70 procentoj de la grupanoj estis laboristoj, kies


plejparto havis riĉan praktikan sperton. La laboristoj kaj teknikistoj lernis unuj de aliaj, kio kreis necesajn kondiĉojn por disvolvi sintezan utiligon de karbo.

En la komenco de la pasinta jaro, tiu teknik-renoviga grupo ricevis la taskon produkti kolor-rivelilon necesan por produkto de koloraj filmoj. Ili sukcesis plenumi la taskon post diligenta esploro kaj ripetada eksperimentado. Poste, ili konstruis el facile disponebla materialo simplan ekipaĵon por rafinado kaj ĝustatempe produktis laŭnorman produktaĵon pogrande, kontribuante per tio en filmigo de revoluciaj modelaj teatraĵoj.

Samtempe kun plena funkciigo de la teknik-renoviga grupo de triflanka kombiniĝo, la fabriko ankaŭ fondis amasan teknikan trupon. En ĉiuj laborejoj kaj laborsekcioj fondiĝis amasaj teknik-renovigaj grupoj, kiuj persistas en entrepreno de sinteza utiligo de karbo dum la produktado.

En la komenco de 1969, la teknik-renovigaj grupoj kunagis unu kun alia por disvolvi sintezan utiligon





*Laboristoj ŝanĝis venenan akvon en sterkan akvon utilan al kreskado de agrikulturaj plantoj forigante fenolon per mikroboj.*

de diversaj rekremento. En eksperimento, ili ekstraktis el fenola rekremento novan produktaĵon urĝe bezonatan de la ŝtato. La revolucia komitato de la fabriko decidis starigi tiucelan ekipaĵon en la fenolrafinejo por produkti ĝin pogrande. Konsultinte la teknikan materialon pretigitan de la teknik-renoviga grupo de triflanka kombiniĝo de la fabriko dum esplorado kaj provprodukto, la amasa teknik-renoviga grupo de tiu laborejo ellaboris taŭge uzeblan projekton simplan kaj facile kompreneblan, lige kun la efektivaj bezonoj de produkto. Sperimentiĉaj veteranaj laboristoj kaj revoluciaj kadroj kune direktis la konstruadon kaj rapide finkonstruiĝis tiu produkta instalaĵo, tiel ke tiu nova produktaĵo estis baldaŭ produktata pogrande. En la praktika produktado, tamen aperis problemoj neantaŭviditaj en la laboratorio kaj dum la industria eks-

perimento. La amasa teknik-renoviga grupo faris ripetadan studon kaj eksperimentadon kaj fine venkis la teknikajn malfacilojn kaj sukcesis produkti laŭnorman produktaĵon pogrande.

### REFORMO DE EKIPAĴOJ KAJ TEKNOLOGIO

Laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ “**Rompu fremdlandajn rutinajn regularojn kaj iru nian propran vojon por disvolvo de industrio**”, tiu fabriko kuraĝe reformis malnovajn ekipaĵojn kaj renovigis malnovan teknologion kaj kreis novajn en disvolvo de sinteza utiligo de materialo.

La lavado de fenolo kaj piridino estas “gorĝo” en la sinteza prilaboro de gudro de tiu fabriko. En la pasinteco, la ekipaĵo kaj teknologio de tiu procedo funkciis kun malalta efiko, malbona kvalito kaj granda malŝparo. En 1970, revoluciaj laboristoj de tiu fabriko faris reformon al la teknologio de lavado de fenolo kaj piridino. Ili ŝparis ĉ. 100,000 juanojn por la ŝtato en investado dum konstruo de la bezonata ekipaĵo, preskaŭ tute utiligante malnovan materialon kaj reformante malnovan ekipaĵon anstataŭ uzi novan, laŭ la principo “**fari revolucion kun ŝparemo**”. Post la reformado, 8 oleujoj, 4 pumpiloj kaj du trionoj de la tublinio estis ŝparitaj, kreiĝis novaj ekipaĵoj kaj teknologio konformaj al la bezonoj de disvolvo de sinteza utiligo de materialo, efektivigis kontinua produktado, lavado sen konsumo de acido kaj malkombino sen uzo de alkalo kaj altiĝis la povo de sinteza prilaborado.

La teknik-renoviga grupo de triflanka kombiniĝo de tiu fabriko havas malgrandan koaksan fornon, kiu servas por eksperimenti novajn receptojn de mikrado de karboj kaj procedojn de koaksigo. Dum disvolvado de sinteza utiligo de karbo, la grupo starigis propramane simplan distilan turon apud la forno por distilado de antracena oleo kaj gudro. Post kuraĝa provado, ĝi atingis sukceson.

Ĝia revolucia spirito entrepreni ion novan per memelpensita metodo kaj surloke disponeblaj rimedoj donis bonan ekzemplon al la tuta fabriko, kaj tiaj ekipaĵoj, metodoj, fornoj kaj tiel plu aperis ĉie kaj novaj ekipaĵoj kaj teknologioj pompe floris en la tuta fabriko. Ekde la jaro 1968, tiu fabriko sukcesis fari 12 relative grandajn konstruojn por sinteza utiligo de karbo, plejparte efektivigitajn tra praktikado kaj rebonigado, en la spirito sinapogi sur propraj fortoj kaj peneme lukti en malfaciloj por entreprenado.

# Feraj Atestaĵoj pri Preparo de la Japana Militarismo por Nova Milito

EN la lastaj jaroj, konforme al la bezono de la agresa kaj milita politiko antaŭenpuŝata de la usona imperiismo en Azio kaj sia propra intenco ekspansii eksteren, la japana militarismo intensigas sian preparon por nova milito. La Sepa Floto de Usono kaj la mara "memdefenda trupo" de Japanio faris grandskalan kunan militan manovron en la Korea Orienta Maro de la 28-a de majo ĝis la 5-a de junio ĉijare por paradi militan forton kaj minaci la popolojn de Koreio, Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj.

La usona imperiismo tutkore volas uzi la japanan militarismon kiel sian pioniron por agresi Azion, dume la japanaj reakciuloj intencas reĝui sian sonĝon pri la "Kunprospera Sfero de Granda Orienta Azio" kaj plenforte sin kroĉas al la usona imperiismo. De la 20-a ĝis la 26-a de majo ĉijare, sub la preteksto de celebros de la tiel nomata antaŭmilita "Mararmea Tago", la japanaj reakciuloj freneze fabrikis militarisman publikan opinionon kaj intensigis armeekspansion kaj militpreparon.

Por kontentigi sian bezonon de grandigo de agresa milito, la malnovaj japanaj militaristoj iam nomis "Mararmea Tago" la 27-an de majo, la tagon en kiu la japana mararmeo venkis la rusan baltan floton en la japana maro en la maljusta milito inter la du imperiismaj rabistoj Japanio kaj Rusio de 1904 ĝis 1905. Ĝi estis fanatike memorigata ĉiujare ĝis la kapitulaco de la japana imperiismo en 1945 por senbride propagandi la "rimarkindajn batalatingojn de la milito sur la maro de Japanio" kaj laŭdaĉi Hejhaĉiro Togo, ĉefon de piratoj de la japana militarismo kaj komandonon de la japana kuna floto kiel "heroon" kaj "komandonon senkomparan". Post la milito, kvankam la "Mararmea Tago" estis

likvidita, tamen la japanaj reakciuloj ne volas forlasi sian banditan ambicion kaj ĉiurimede klopodis konservi tiun "memortagon". Ekde la unua duono de la kuranta jaro, kun la intensigita revivigo de la japana militarismo fare de la japanaj kaj usonaj reakciuloj, la japanaj reakciuloj pli freneze faras tiajn aktivadojn.

La Memoriga Ŝipo Mikasa de la japanaj reakciuloj en Jokosuka estis neniu alia ol la flaga ŝipo Mikasa, sur kiu veturis Hejhaĉiro Togo dum la milito inter Japanio kaj Rusio. Sur la placo kontraŭ la ŝipo Mikasa, estis kupra statuo de Hejhaĉiro Togo.

La japanaj reakciuloj aranĝis tri permanentajn ekspoziciojn en tiu ŝipo: unu pri la "historio de disvolviĝo de la imperia mararmeo" — la historio de la japana kanonŝipa politiko; alia pri la "rimarkindaj batalatingoj" de la "milito sur la japana maro" por glorigi Hejhaĉiro Togo; kaj la tria pri la "memdefendaj trupoj" por reklami la nunajn japanajn ter-, mar- kaj aer-fortojn. En la ŝipo estis establita oficejo por varbi novajn membrojn de la "memdefendaj trupoj".

La ĝenerala klarigo de la unua ekspozicio diras: "La prosperiĝo kaj disvolviĝo de la moderna Japanio nomataj kiel miraklo de la nuna jarcento estas neapartigeblaj de la disvolviĝo de la mararmeo (de Japanio)." En la dua ekspozicio, la japanaj reakciuloj ekspoziciis la agresajn atestaĵojn de la japana imperiismo kiel postlasaĵojn de la "famkonata generalo" Togo. Inter tiuj "postlasaĵoj" troviĝas militaj uniformoj, sabro, binoklo, "mararmea flago" iam flirtanta sur la ŝipo Mikasa kaj "impe-





*Japanaj popolanoj okazigis kunvenon kaj manifestacion en Tokio por forte protesti la krimojn de la usonaj kaj japanaj reakciuloj en revivigo de la japana militarismo.*

riestra mesaĝo” de Mikado Meĵi por laŭdi Togo kopiita de Togo kaj kondolencna parolado farita de japana Mikado Hirohito por la ŝtata funebro de Togo. Hirohito naŭze laŭdis tiun buĉiston kiel “tipon de militaj ministroj” kaj “apogilon” de la “ŝtato”. En la tria ekspozicio, estas ekspoziciitaj granda nombro da fotoj pri la vestoj kaj manovro de japanaj teraj, maraj kaj aeraj “memdefendaj trupoj”, kaj ankaŭ multaj modeloj de tankoj, falkaj misiloj, militŝipoj kaj aviadiloj. Sur iu mapo pendigita en la ekspozicio de mara “memdefenda trupo” oni desegnis multajn sagojn, kiuj etendiĝis al sep maroj kun Japanio kiel la centro. Super kaj sub la mapo estas jena skribo: “Oceano estas vivlinio de Japanio”, “Se okazos incidento, eskorti la komercajn ŝipojn estas grava tasko de mara memdefenda trupo” kaj tiel plu. Ĉio ĉi tio plene malkaŝis la febran ambicion de la japanaj reakciuloj etendi siajn agresajn ungegojn al diversaj lokoj de la mondo.

Post la milito, la usonaj kaj japanaj reakciuloj prenis “Togo-templon” kiel instrumenton por revivigi la japanan militarismon kaj decidis okazigi memor-aktivadojn en la 28-a de majo ĉiujare.

“Ceremonio” estis okazigita en la centra halo de “Togo-templo” antaŭtagmeze de la 28-a de majo ĉijare. La ĉefo de la ĝenerala stabo kaj la ĉefoj de la stabo de la teraj, maraj kaj aeraj fortoj de Sato-

registro ĉeestis la ceremonion en milita uniformo. Ĉeestis ankaŭ pli ol 200 malnovaj militaristoj, inkluzive de antaŭ-milita kapitano de la militŝipo Mikasa. En la “ceremonio”, novaj kaj malnovaj militaristoj faris riverencon al la epitafo de Togo.

Vespere, en “Togo-templo” la japanaj reakciuloj, trompe kolektis pli ol du cent knabojn, donis al ili po lanternon kun la vortoj “Togo-templo” kaj tiuj faris lanternan paradon ĉirkaŭ la templo. Tia lanterna parado estas imitaĵo de ceremonioj okazigitaj en milito por “festi” la “venkojn” post kiam la japana militarismo okupis novan lokon de Ĉinio aŭ sudorient-aziaj landoj. Dum pli ol 20 jaroj post la milito, la japanaj reakciuloj neniam kuraĝis okazigi tiajn aktivadojn en “Togo-templo”. Ĉijare, ili unufoje sin returnis al la lanterna parado. Tio estas feraj atestaĵoj pri la preparo de la japana militarismo por nova agresa milito.

La popoloj de Ĉinio, Koreio, Vjetnamio kaj aliaj sudorientaziaj landoj en la sepdekaj jaroj ne estas facile tiraneblaj. Ĝuste kiel la granda gvidanto de la ĉina popolo kamarado Maŭ Zedong montris: **“Levi ŝtonegon kaj ĝin faligi sur siajn proprajn piedojn” estas ĉina popoldiro por priskribi la konduton de iuj stultuloj. La reakciuloj en diversaj landoj ĝuste estas stultuloj de tia speco.**” Se la japanaj reakciuloj obstine volas suriri la vojon por fari novan militon en Azio, ili certe estos frapita ĝis kaprompiĝo.



# La Tiel Nomata “Kunprospera Sfero de Granda Orienta Azio”


LA tiel nomata “Kunprospera Sfero de Granda Orienta Azio” oficiale deklarita en 1940 de Matsuoka Yosuke, japana ministro de eksterlandaj aferoj de Kono-kabineto, estas koloniisma plano elbakita de la japana militarismo en la Dua Mondmilito por agresi kaj sklavigi la popolojn de Azio. Sub la ŝildo de la tiel nomata “kunekzisto kaj kunprospero”, la japana militarismo vane intencis fondi en Azio siajn koloniojn kaj influferon — la “Kunprosperan Sferon de Granda Orienta Azio” inkluzivantan Ĉinion, Koreion, Hinduĉinion, Birmon, Tajlandon, Malajon, Filipinojn, Indonezion kaj aliajn aziajn landojn kaj regionojn kun Japanio kiel la mastro.

Dum la Dua Mondmilito, la japana militarismo lanĉis sangan agresan militon kontraŭ Ĉinio kaj multaj aliaj landoj de Azio, kruele buĉis iliajn popolojn, freneze rabis ilian riĉaĵon kaj per tio ĝisfunde malkaŝis la faŝisman esencon de la tiel nomata “Kunprospera Sfero de Granda Orienta Azio”. La ĉina popolo kaj la diverslandaj popoloj de la regionoj de Azio kaj Pacifiko brave leviĝis kaj rezistis kontraŭ la japana militarismo kaj fine frakasis ĝian ambicion tirani super Azio.

Post la Dua Mondmilito, la japana reakciularo neniam forlasis sian ambicion denove starigi la “Kunpro-

speran Sferon de Granda Orienta Azio”. La reviviĝanta japana militarismo, sub nutrado fare de la usona imperiismo, vane intencis efektivigi sian bankrotintan malnovan planon apogante sin sur la usona-

japana milita alianco. La diverslandaj popoloj de Azio certe ĝisfunde rompos la kriman agresan intrigon de la japana reakciularo, samkiel la arogantan planon de la japana militarismo en la Dua Mondmilito.



*Oponu kontraŭ la intrigo de la japana militarismo por denova agreso. (el “Korea Bilda Revuo”)*





## JAPANAĴ KAMPARANOJ MALHELPIS LA PAFEKZERCON DE JAPANAĴ “MEMDEFENDAĴ TRUPOJ”

Kun la helpo de laboristoj kaj studentoj, kamparanoj en Nagi, Okajama, sukcese malebligis la pafekzercon de “memdefendaj trupoj”.

En junio, kiam la “memdefendaj trupoj” anoncis planon de pafekzerco, la kamparanoj de Nagi firme oponis kontraŭ tiu plano kaj sub la apogo de centoj da laboristoj kaj studentoj plene preparis sin por batalo. Timigitaj de la batalpreteco de la popolo, la “memdefendaj trupoj” devigate nuligis la planon en la 23-a de junio.

La japanaj “memdefendaj trupoj” krome planas fari ekzercojn de kanonado en Nihonbara Ekzercejo dum julio, aŭgusto kaj septembro. Kontraŭ tio la kamparanoj kaj iliaj subtenantoj — laboristoj kaj studentoj — jam decidis batali kontraŭ ĝi ĝis la fino.

## FORPELU LA USONAĴN IMPERIISTOJN KAJ DEHAKU LA AGRESAĴN UNGOJN DE LA JAPANA MILITARISMO

La 5-an de julio la korea “Rodong Sinmun” aperigis artikolon de sia komentisto por kondamni la naciper-

fidulon Pak Ĝen Hi pri liaj daŭraj naciperfidaj krimoj sub la ŝildo de t.e. “paca reunuiĝo”.

La artikolo malkovris, ke la kriaĉo pri “paca reunuiĝo” de Pak Ĝen Hi sub manovro de la usona imperiismo estas nur trompo kaj politika intrigo. La kliko de Pak Ĝen Hi unuflanke kriaĉas pri “paco” kaj “paca reunuiĝo”, sed aliflanke ĝi sekrete komplotas kune kun la milita kolportisto Agnew kaj la ĉefo de japana militarismo Sato pri “modernigo” de la pupaj trupoj kaj “sekurigo de suda Koreio”, petante rapidan “perfektigon de la batal sistemo” ĉe Usono kaj plenskale enkondukante la japanajn militaristojn.


La artikolo montris en la fino, ke la popolo de suda Koreio devas leviĝi unuanime por forpeli la usonan imperiismon, dehaki la denove enŝoviĝintajn agresajn ungojn de la japana militarismo, faligi la klikon de Pak Ĝen Hi, la duoblan lakeon de la usonaj kaj japanaj reakciuloj kaj efektiviĝi la reunuiĝon de la patrolando.


## MALKONSTRUO DE USONA AERA BAZO EN LA PAZ

En la 16-a de junio, laŭ la ordono de la registaro de Bolivio usona aera bazo en La Paz estis ekmalkonstruata.


La aera bazo estis konstruita en El Alto de La Paz, la ĉefurbo de Bolivio, dum la periodo de la antaŭa prezidanto Barrientos, kiam la usona imperiismo senkrupule faris militajn intervenojn en Bolivio. La malkonstruado estis farata laŭ la decido de la registaro de Juan Jose Torres.

*Japanaj kamparanoj de Norda Fuji, Jamanaŝi brave baras usonajn trupojn survoje al la pafejo de Norda Fuji por ekzercado.*





*La popolo de Vensan, Koreio kunvenas por firme oponi kontraŭ la revivigo de la japana militarismo fare de la usonaj kaj japanaj reakciuloj.*



**SKRIBIS ĈEĤOSLOVAKA  
LEGANTO J. J.**

La artikoloj kaj bildoj en la revuo montras admirindan kaj sukcesan penadon de la ĉina popolo. La revuo montras ankaŭ, ke kvankam Ĉinio estas granda nacio en la mondo, tamen ĝi estas amika al malgran-

daj nacioj. Mi estas ano de malgranda nacio kaj la menciitan fakton alte taksas. El la artikoloj mi ekkonis multajn ideojn de via granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong. La ideoj ŝajnas al mi tre prudentaj, tre utilaj por progresaj homoj ĉie en la mondo, eĉ necesa gvidilo ĉe gravaj situacioj.

Mi faris vian revuon lernolibro de Esperanto. Mi opinias, ke mia elekto estis tre bona. Sekve de la legado de via revuo mia Esperanto pliboniĝis, kaj nun mi povas korespondi kun amikoj en diversaj landoj. Al ĉiuj korespond-amikoj mi skribis pri la revuo *El Popola Ĉinio*.

**SKRIBIS GFR-LEGANTO M. Z.**

Dum pli ol 15 jaroj, ekde kiam mi lernis Esperanton, mi konas kaj legas vian revuon EPĈ. En mia lando ne estas facile havi detalajn kaj fidindajn informojn pri la nuna stato de Ĉinio, kaj mi volonte ĉerpas informon el la riĉa fonto de via informilo. Mi ankaŭ montras la revu-kajerojn al aliaj esperantistoj kaj kolektas tiujn ekzemplerojn, kiuj por mi estas plej interesaj.

Mia opinio pri la problemo de la hindoĉinia milito estas simila al la konstatoj, kiujn vi esprimis en via revuo.



## Sur la kovrilo:

Ĉina tablotenisisto Ĝuang Zedong (la meza en la fronta vico) kaj eksterlandaj tablotenisistoj

## Sur la dorskovrilo:

Somero ĉe Kunming-lago de la Somera Palaco, Pekino

## Korespondi Deziras

\*Pavlina Novosadova, Nobrezi 522, Budisov n/Bud., Okr. Opava, Ĉeĥoslovakio dez. interŝanĝi poŝtkartojn de urboj.

\*De Angelis Roberto, 23j. itala laboristo, kun ĉel pri ĉt, Via Amico da Venafro, 14, I-00100 Roma, Italio

\*Fischthaller Josef, Oberhart 153, 4600 Wels, Aŭstrio kun aziaj kaj albanaj gek-doj.

\*Jiri Martinek, 21j., Gottwaldov, Padelky č. 3915, Ĉeĥoslovakio kun gejunuloj kaj interŝanĝi bk.

\*Paul Boden, Goethestr. 14, 8514 Pulsnitz, Germana Demokrata Respubliko, kun ĉel kaj interŝanĝi bk.

\*Krzysztof Garbaciak, Gdansk, ul. Piwna 5/6 m4, Pollando, kun aziaj kaj latinamerikaj esp-istoj.

\*S-ro Jan Vedevik, 50j., Poste Restante, 401 01 Goteborg 1, Svedlando, kun ĉel kaj interŝanĝi fotojn kaj bk.

Jenaj gelernantoj el Rumanio dez. kor. kun gekolegoj el tuta mondo:

\*Dobroghiu Paraschiva, lernantino 14j., str. Plevnei 88, Suceava 3.

\*Angela Seşurschi, lernantino 14j., str. Plevnei 87, Suceava 3.

\*Rodica Asimionoaie, lernantino 14j., str. Lev Tolstoj 19, Suceava 3.

\*Marian Dinicu, lernanto 14j., str. Lev Tolstoj nr. 1, Suceava 3.

\*Hutanu Viorica, lernantino 14j., str. Lev Tolstoj 13, Suceava 3.

\*Cujba Tiberiu, lernanto 15j., str. C. Porumbescu 1-C-3, Suceava 1.

\*Bontean Branduša, lernantino 15j., str. Gh. Doja 12, Suceava 5.

# EL POPOLA ĈINIO

人民中国报道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

**N-ro 9 (158) 1971**

## Ĉefa Enhavo

La Nacioj de Ĉinio Marŝas sur Larĝa Vojo

Vizito al la Petrolkampo Daking

La Petrolminejo Jumen en Lerno de Daking

Instruistoj kaj Lernantoj Parolas pri la Eduka Revolucio

Novaj Fruktoj en la Eduka Revolucio

Kantistino Ascendis Instruan Podion

Sur la Longa Transporta Linio inter Kinghaj kaj Tibeto

Por ke Blinduloj Vidu

Nova Fizionomio de Kamparo Akvoriĉa

Arbaroj sur Sablaj Montetoj

Prospera Monturbo

Renovigo de Ordinara Tornilo

Floras la Amikeco inter la Popoloj de Ĉinio kaj Koreio

Komuniko pri Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko

Vizito al la Kantona Instituto de Kamparana Movado

Sinteza Utiligo de Karbo

Feraj Atestaĵoj pri Preparo de la Japana Militarismo por Nova Milito

# Riĉa Rikolto de Someraj Kultivaĵoj



En la kuranta jaro, pliprodukto de tritiko estas akirita sur la ebenejo ambaŭborde de Vejhe-rivero en Ŝenhi-provinco. Jen komunumanoj selektas bonan semon.





Post riĉa rikolto de tritiko  
komunumanoj ĝustatempe  
vendas tritikon al la ŝtato.



*Supre maldekstre:* Ŝifang-gubernio de Siĉuan-provinco akiris ĝeneralan pliprodukton de tritiko kaj kolzo en la kuranta jaro. La foto montras, ke membroj de Zaŭgjue-komunumo rikoltas tritikon.


Kompartiano Ĵenzengvanggie (*maldekstre*), estro de la revolucia komitato de Lieking-komunumo de Longzi-gubernio de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, kaj liberigita servutulo ĝojas pro la riĉa rikolto.







En la kuranta jaro, Ĉenĝi-brigado de Fengĵang-gubernio, Anĥuj-provinco akiris riĉan rikolton de tritiko sur pli ol 6,000 muoj da kampoj.





La meznombra pomua produkto de somera rikoltaĵo de Longkiaŭ-brigado de Vuhian-gubernio, Giangsu-provinco kreskis je pli ol sep dekonoj kompare kun tiu de la pasinta jaro. Komunumanoj ĝoje babilas pri la riĉa rikolto dum laborpaŭzo.

沿着毛主席革命路线胜利前进



Dank' al 73 bonaj specioj elkulturitaj kaj enkondukitaj de sia scienca esplora grupo, Heheng-brigado unupaŝe efektivigis ĝeneralan aplikon de bona tritika specio.





Riĉa rikolto de kolzosejoj de Laŭgang-komunumo de Nanhuj-gubernio de Ŝanhajo





